


Esperanto

V-19034

1958

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道



4

1958

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO-LIGO




Zhao-jun Sendata Norden
de la Granda Muro

Wu Song la Tigro-
mortiga Heros

KUNĈJU-OPERO DENOVE EN LA ĈINA TEATRO

(Fotoj de Wu Hua-xue)



Scenoj el Dek Kvin Ĉenoj da Moneroj



Kolektado de Popolkantoj

La redaktoro de la gazeto "Folkloro" de Ĉina Folkloro Societo lastatempe intervjuis k-don Guo Mo-ruo, la fama poeto kaj verkisto en Ĉinio, kaj demandis al li pri la valoro kaj rolo de popolkantoj — folkloro, kaj pri ilia kolektado kaj redaktado. Ĉi-sube ni presigas liajn respondojn, iom mallongigitajn.

— La Red.

1. Kion vi pensas pri la kampanjo de kolektado de popolkantoj, kiu nun prospere disvolviĝas?

Resp.: Tio estas bona afero. La kolektado de popolkantoj estas tre malnova tradicio en nia lando. En antikva tempo, ni jam havis la sistemon "cai feng" (kolektado de "feng"—popolkantoj). El la 300 poemoj en Shi-jing (klasika poemaro)*, la plejparto estas popolkantoj. La similon daŭre faradis pli malpli elstaraj literaturistoj de diversaj epokoj. Mi ĝojas vidi, ke ni nun tion povas fari en senprecedenca skalo. La klasika poemaro Shi-jing ^{miesiana} kribrita de Konfucio enhavas iom pli ol 300 poemojn. La rikolto de nia nuna kolektado eble nombriĝos per centoj da

milionoj, ĉar la laboron plenumas la vastaj amasoj, inter kiuj aperos multaj Konfucioj.

La kolektado per popolamasoj estas tre bona metodo, sed la laboron devas partopreni ankaŭ fakuloj. La Ĉina Folkloro Societo povus starigi kelkajn filiojn en ĉefaj lokoj, tiel ke troviĝu diversloke specialistoj sin dediĉantaj al la laboro. Sed post difinita periodo, ekz., en jarkvino koincida kun la kvinjara plano, ni povus elekti el la laŭnhave samspecaj pli malpli vere plej bonajn 300 popolkantojn kaj ilin redakti en unu libro, ke ĝi fariĝu nova "guofeng" (popolkantoj laŭregionaj) en nuntempo. Ĝia granda signifo estus vere netaksebla.

Gravan rolon ludas la popolkantoj por kuraĝigi, eduki, organizi la popolamasojn kaj samtempe ili estas vere belaj literaturaĵoj. En la du kolektoj kolektitaj de via societo troviĝas tre bonaj pecoj, ekz.:

Mont-sude . . . Mont-norde . . .
(Popolkanto)

Mont-sude loĝas mia frato**,
Mont-norde mi — fratin'.
Mi volus lin alkanti por aŭdigigi min,
Sed baras mont' la voĉon al la amato.
Donaci florojn volas mi al li,
Sed oni mirrigardus mian montgrimpadon.

Jen la kolhoz' fondiĝis tiun ĉi monaton,
Mont-sud' kaj mont-nord' fariĝis unu famili' —
Vidante lin de la maten' ĝis nokta horo,
Mi aŭskultadas vortojn liajn el la koro.

Ni devas pagi apartan atenton al la popolkantoj de naciminoritatoj. Inter ili abundas belaj kantoj kiel tiuj de "Guofeng". Tion decidus ilia vivo. La Han-nacio, influite de la Song-skolo[†], perdis

* Shi-jing estas klasika poemaro redaktita de Konfucio (551-479 a.K.). En ĝi estas kolektitaj 305 antikvaj poemoj, popolaj kaj nobelaj kantoj, dividitaj en tri kategorioj.

** Geamantoj en Ĉinio ofte nomas sin frato kaj fratino.

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto
Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

ENHAVO

Bildo sur la kovrilo — Terkulturo en Mont-regiono (Lignogravuraĵo de Li Hua)

La Ses Grandaj Havenoj

Batalo kontraŭ Sabloventego

Pri Kunĉju-opero

La Kampanoj Marŝas al la Kulturo

Rakonto pri Terpromoj

Kunlaboro kontraŭ Erozio

Unu Ŝuo

Kurso de Ĉina Lingvo

La Epoko de Printempo kaj Aŭtuno

Esperanta Movado en Ĉinio

Bildo sur la dorsa kovrilo — Fariĝu Bona

Filino Kamparana (Pentris Li Hong-ren)



Kulturlaboranto de la urbo Xi'an kolektas popolkantojn

Foto de He Ai-qun

iom sian kreemon pro kateniĝo de la penso. Sed nun, post liberiĝo de la pensado, aperos ĉe ili certe belaj popolkantoj. Apud la kantoj pri la nuna flugsalto en ĉiuj sferoj de la popola vivo, kiujn ni devas kolekti, ni ne preterlasu ankaŭ tiujn el pasintaj tempoj, ili estas ankaŭ tre valoraj kaj havas grandan signifon.

La kolektado jam komenciĝis, ĝin sekvas nepre la studaj laboroj. Kompari kaj trovi la diferencojn kaj karakterojn de la popolaj kantoj inter diversaj gubernioj kaj provincoj, inter tiu kaj aliaj nacioj, inter la naciminoritatoj entute kaj Han-nacio, ja estas temoj studendaj.

2. Kian rolon povos ludi la kolektado de folkloro en nia literatura kreado kaj formiĝo de ĝia nacia stilo?

Resp.: Niaj modernaj literaturistoj ne sufiĉe atentis pri la nacia tradicio. Kio imitita de Ai Qing, Hu Feng k. a., estas formoj fremdaj kaj por la popolamaso ne akcepteblaj.

El la literatura historio ni konstatas, ke la aperon de ĉiu nova literatura formo ĉiam antaŭiris la folkloro. La versoj de ĉinaj poemoj dum tre longa tempo restis kvar silabaj. La kvinsilabaj versoj enradikiĝis en la poemo nur en la unua duono de la dua jarcento, dum en popolkantoj ĝi jam ekzistis pli frue. Kaj la sep-silabaj versoj aperis ankoraŭ pli malfrue. En la tempo de Tri Regnoj (220-280 p. K.) regis ĉefe la kvin-silabaj versoj, sole Cao Pi, reĝo dum 220-226 p.K. en Wei-reglando postlasis al ni iun pli bonan poemon el sep-silabaj versoj. Sed la popolkantoj kaj proverboj jam multe frue alprenis tiun formon. Plejparto el la cititaj popolkantoj kaj proverboj en

la "Historio de Posta Han-dinastio", estis en tiu formo.

La supereco de popolkantoj estas natureco kaj senafekteco, kio meritigas lernadon de la poetoj. Ĝenerale estas du skoloj en literatura kreado: Unu skolo rekte eldiras, kvazaŭ senpripense la ricevitajn impresojn pri la vidaĵo. La alia estas de ornamado, kiu povas esti foje bona, sed tre multfoje ankaŭ malbona. Por starigi simplan kaj naturan stilon, oni multe profitas el la lernado de popolkantoj.

Kio estas folkloro? Ĉu ĝi estas fonto aŭ elfluo en literaturo? Laŭ mia opinio, ĝi estas fonto kaj samtempe ankaŭ elfluo. Ĉar pasinte, pro limigiteco de kultura nivelo, la popolamaso ne scias skribi kaj verki, ili povis ion melodiigi nur buŝe. Iuj eminentaj literaturistoj trovis ion embrian el la buŝo de la popolamaso kaj ilin ekregistris. Dank' al tio la popolkantoj konserviĝis kaj ankaŭ plu evoluigis. Sed nun la popolamaso jam ekposedas la kulturon, el ili mem leviĝos poetoj kiel Qu Yuan, fama poeto antaŭ du jarmiloj. Tamen la neprofesiaj verkantoj en la popolamasoj havas sian propran fakon, ili nur foje kaj foje inspirite kreas literaturaĵojn enhavriĉajn kaj kun certa artnivelo, kiuj ankoraŭ bezonas evoluigon kaj poluron fare de profesiaj beletristoj. Kiam leviĝas la nivelo de la neprofesiaj verkoj de la amaso, leviĝos ankaŭ tiu de la profesiaj verkistoj, t. e. "la ŝipo leviĝas kun la akvo"! Ligite kun la popola, neprofesia kreado, la estontaj kreaĵoj de la profesiaj verkistoj fariĝos ankoraŭ pli grandiozaj kaj riĉvariaj ol nun.

Tion mi povas konstati ankaŭ en la historio. Plejparto el Shi-jing estas verkaĵoj el la popolamaso. Estas ne pli ol 20 poemoj, kies aŭtoroj estas troveblaj. Kaj eĉ la poemoj Guofeng estis kribre elektitaj kaj poluritaj. Rilate la verkojn de la fama poeto Qu Yuan, kiel oni scias, ili multe ensorbis la stilon de la popolkantoj kaj sur ties bazo evoluigis.

Tre riĉa estas nia folkloro, sed ni ne devas kontentiĝi sole pri ĝia riĉeco, gravas eltiri kaj suĉi la bonajn elementojn el la embrio. Ekzemple, de kiam la homaro komencis bruligi la karbon, la fumo estas libere forblovita, kiom da utilaj substancoj perdiĝis en tio! Ja el la fumo oni povas eltiri la duonkondukanton germaniumon, per kiu tiu ĉi objekto (la poeto montris sian mikrofonan aŭdhelpilon) estas farita. Ja el embrioj multo povas elkreski! Lernante de la folkloro ni devas same eltiri, sorbi, sintezi kaj krei. Kaj tiel aperos antaŭ ni vastaj perspektivoj.

3. Kion valoran la folkloro havas por sciencaj studadoj ekzemple por historio? Volu diri vian opinion.

Xj duonkondukanto = poluprovodnik
Xj aŭdhilo = studovka

Resp.: La folkloro ludas gravan rolon kiel historiaj materialoj. En antikvaj libroj troviĝas certaj, kvankam ne multaj, relative fidindaj popolkantoj, kiuj estas tre valoraj, ĉar ili estas materialoj de "unua mano", materialoj puraj, ne falsigitaj. La valoro troviĝas ĝuste en la "unua-maneco".

Kemie analizante akvon, ni devas uzi tiun kemie puran, la distilitan, por ricevi la ĝustan rezulton — H₂O. Ne taŭgas, ĉi-kaze, akvo nepura, hazarde ĉerpita el iu ajn laĝeto.

En tiu senco, la popolkantoj kaj folkloro havas grandan valoron por studo de historio. Kvankam tiuj trovitaj en antikvaj libroj, estis registritaj pere de la manoj de literaturistoj, certe ili pli malpli ŝanĝiĝis, kiel diras la proverbo "parolo post tria transdono eksonas kun alia tono", ili tamen donas pli malpli la originan guston kaj spegulas la penson de la popolo, kaj estas multe pli fidindaj ol la oficiala historio, iurilate eĉ ol la elfosaĵoj el sub la tero. Ĉar la elfosaĵoj kun surskriboj, precipe tiaj kiaj epitafoj, estas ĉefe el flataj vortoj. Kiu ja malŝate riproĉus la mortinton, por kiu li verkas epitafon?

En Shi-ĵing, oni povas trovi multe da materialoj utilaj por historia studado el Guofeng (la unua parto de Shi-ĵing), ĉar ĝi konsistas el popolkantoj; malpli jam el la "Malgranda kaj Granda ya" (dua kaj tria partoj de Shi-ĵing); des malpli el la "Tri Song-oj" (la kvara parto de Shi-ĵing).

4. Iuj pensas ke la popolkantoj valoras ĉefe sur la tereno literatura, aliaj pensas ke sur la scienca. Kio estas via opinio?

Resp.: Ĝi estas valora por la ambaŭ terenoj. Literaturistoj zorgu pri ĝia literatura flanko kaj sciencistoj la sciencon. Ĉiuj povas studi laŭ postulo de sia propra fako, neniuj povus limigi la valoron je nur unu punkto.

5. Koncerne al la sintenado kaj maniero de kolektado kaj redaktado, iuj emfazas la neceson de fidela registrado, aliaj emfazas tiun de bona redaktado kaj polurado. Kiel oni devas agi laŭ via konvinko?

Resp.: La konservado de originaj materialoj estas necesa, kaj la redaktado estas ankaŭ necesa, unu ja ne ekskluzivas la alian.

Por scienca studado oni nepre bezonas la fidelajn originajn materialojn. Precipe por filologoj teksto modifita malebligas la studadon. Al la sciencistoj gravas la unuamanececo. Kaj eĉ por bone redakti kaj poluri necesas ankaŭ fidindaj materialoj. La fideleco de la origina registrado estas

la bazo de laboroj. La originalaj materialoj estu grandkvante konservataj.

Sed laŭ belestrika vidpunkto, redaktado kaj polurado estas ankaŭ tre gravaj. Poemo, kiel ĉiu pli malpli sperta persono scias, ja povas esti transformata en oron el ŝtono, per sola fingrotuŝo. Per ŝanĝo de sola vorto, la tuta poemo ekvivus kaj eksonorus. Estas ekster dubo, ke Guofeng estis kribre elektita kaj polurita. La redakta laboro de Shi-ĵing estas laŭdinda, kvankam la originaj materialoj bedaŭrinde al ni ne retroveblaj. Kaj hodiaŭ, ni bezonas ankoraŭ multajn Konfuciojn, ĉu grandajn ĉu malgrandajn por redaktado de popolkantoj.

La redaktado kaj polurado estas utilaj ankaŭ por disvastigado de la norma prononco. La popolkantoj estas kreitaj en dialektoj, kiuj havas sian vivon, tamen ne restas ĉiam sensanĝaj. La trafikado tiom faciligis nun, ke vojaĝo de Pekino al Moskvo daŭras nun nur kelkajn horojn. En pasinteco vojaĝante de Kantono al Pekino, oni devis suferi milojn kaj milojn da malfacilaĵoj kaj penoj, sed kiom facile jam fariĝas nun! La kolektiva vivo ankaŭ treege vastiĝas, la interfludo de diverslokaĵoj rezultigas nature la modifiĝon de la dialektoj. Ankaŭ la dialektaj elementoj de la popolkantoj ŝanĝiĝos. Oni ne devas rigardi ĝin tro rigide.

6. Iuj laborantoj de folkloro estas skrupulaj pri la nova folkloro, precipe pri la kreaĵoj de la laboristoj. Ili konstatas, ke laŭforme, tiuj kreaĵoj ne similas al la tradiciaj, ankaŭ la naskiĝo kaj cirkulado estas aliaj — iuj estas kreitaj per la plumo, sed ne per la buŝo, aŭ estas ankoraŭ ne vaste cirkulataj en la popolamaso... kaj tial ili ekhezitas antaŭ tiuj kreaĵoj ne sciante kion fari. Ĉu vi opinias ilin pravigeblaj?

Resp.: Ĉio evoluas kun la generacioj, same la popolkanto. Kvankam ĝi havas tradicion, sed

Xinjiangaj muziklaborantoj registras popolkantojn

Foto de Ding Bin-xuan



La Nova Haveno de Tanggu kaj Zhanjiang-haveno

Wu Xi-en:

LA historio de la havenoj en malnova Ĉinio estis plena je humiligoj. Ekde la perforta malfermo de kvin havenoj al la fremdlandoj, kiel rezulto de la Opi-milito (1840-1842), ilia konstruado, administrado kaj utiligado falis tute en la manojn de la imperialistoj. Nur post la liberiĝo de la tuta lando aliĝis radikale la situacio. En mallongaj kelkaj jaroj, la kelkdekjara revo de 1' ĉina popolo por mem konstrui havenojn fine efektiviĝis. Plie, la antaŭaj havenoj ankaŭ ricevis tute novan fizionomion.

Unuaj menciindaj atingoj en tiu rilato estas la finkonstruo de la Nova Haveno (Sinkang) de Tanggu apud Tianjin kaj Zhanjiang-haveno en suda Ĉinio. En la tempo tuj post la liberiĝo, la Nova Haveno de Tanggu estis ŝlimŝtopita, ke nur

La Ses Grand

3-4,000-tonelaj ŝarĝŝipoj povis en- aŭ el-veturi dum fluso, kaj Zhanjiang-haveno havis nur unu malnovan kadukan varfon, al kiu povis albordiĝi nur 100-tonelaj malgrandaj ŝipoj. Sed jam fariĝis nun unu el la plej grandaj havenoj en norda Ĉinio la Nova Haveno de Tanggu, kiu havas du profundakvajn varfojn, kie povas albordiĝi samtempe kvin oceanaj vaporŝipegoj de 10,000-tonela grado. Ĝian ŝipkluzon interligantan Bohai-golfon kun Hai-rivero, la plej grandan ĝis nun konstruitan en la oriento, povas trapasi ŝipoj de 3,000 toneloj. La

ĉiam ĝi detruis la tradicion kaj kreas novan formon. Ne eblas ĉion taksu rigide, per unu sola kriterio.

Estonte la verkintoj aŭ unuaj kantantoj de popolkantoj estos troveblaj. Se la estintaj kreintoj de popolkantoj estis anonimaj herooj, tiuj estontaj estos konataj.

Certe multajn komplikajn problemojn ni alfrontos ĉe novaj popolkantoj sed ne necesas tro da skrupulo. Oni ne katenu sin per la vortoj lernitaj el libroj, sed studu la aktualajn vivantajn fenomenojn.

Literaturaj laborantoj kompilas popolkantarojn el la kolektitaj materialoj

Foto de He Ai-qun



Ĉio bona nature disvastiĝos, ne necesas maltrankviliĝi pro ĝi. Sed, hodiaŭ ni havas respondecon, eĉ per ĉiuj rimedoj, disvastigi ĉion bonan, se ĝi ankoraŭ ne estas diskonata. La nuna kampanjo de grandskala kolektado estas unu el la rimedoj, Disvastigu la popolkantojn kaj folkloron tra la tuta lando, konigu ilin al la venontaj generacioj kaj la plej bonajn, oni devas disvastigi eĉ tra la mondo ekster la landlimojn.

En la pasinteco, la historio disvolviĝas nature; en la estonteco precipe sub la sistemo de socialismo, ĝi disvolviĝos konscie. Ĉion bonan oni faru laŭplane kaj grandskale, ni estu la antaŭpuŝantoj.

Se iu hezitas pri la kolektaj laboroj, tio montras, ke io ne estas en ordo sur la vojo de li sekvata. Eble li havas iajn motivojn por tio, sed ili estas pravaj nur por iu alia vojo ol la nia, — “Ĝi estas vojo, kiel ĝi estas nomata, sed ne estas la vojo de mi celata.”

Ni sekvas la vojon de socialismo kaj uzas la rimedon karakterizatan per “pli multe, pli rapide, pli bone, pli ŝpare” ni ne nur ne devas “heziti”, sed eĉ devas labori per nia plena impeto.

Trad. Tikos

†Song-skolo estis la konfucianoj el Song-dinastio (960-1276 p.K.), kiuj skolastike eksplikis la instruojn de Konfucio por apliki ilin al la vivo.


aj Havenoj

haveno estas konstruita tute de ĉinoj mem kaj per ĉinaj materialoj. Laŭ la skalo, ĝi estas la plej granda artefarita haveno en nia lando. La konstruado estas ankoraŭ daŭrigata.

La ĉefaj partoj de la konstrua laboro en la unua stadio de Zhanjiang-haveno estas jam finitaj. La profundakva varfo, la mezgrada varfo kaj la ole-kajo jam komencis funkcii. Ĉe la proksimume 400 metrojn longa profundakva varfo povas alborde ĝi du ŝipegoj de 10,000-tonela grado samtempe, dum ĉe la malpeza varfo de la ole-kajo, 25,000-tonela oleŝipego. La moderna mekanikigita Zhanjiang-haveno estas la unua en sia speco, kies projektadon kaj konstrulaboron mem faras ĉinoj. Kiam la tuta laboro dividita en tri stadiojn estos tute finita, ĝi povos en- kaj el-ŝarĝi 4,600,000 tunojn da kargoj ĉiujare.

La Novaj Aspektoj de Ŝanhaj-haveno, Huangpu-haveno kc.

Dum la lastaj jaroj, ankaŭ estas entreprenita grandskala pligrandigado kaj rebonigado en la havenoj de Ŝanhajo, Kantono, Qingdao kaj Dajreno. Ĉe la plej suda punkto de la 70 liojn longa haveno de Ŝanhajo jam konstruiĝis du varfoj interligantaj maran kaj fervojan transportadon, kie povas alborde ĝi 10,000-tonelaj ŝipegoj. La famekonata Shiliupu-varfo estas plivastigita je 22,000 kvadrataj metroj. La plilongigo de Huishan-varfo estas ankaŭ finita. La jara kvanto de en- kaj el-ŝarĝado de la pligrandigita Ŝanhaj-haveno jam pliiĝis je 2,370,000 tunoj. Antaŭ sep aŭ ok jaroj ĉe Huangpu-haveno en Kantono troviĝis preskaŭ nenio alia ol unu neperfekta digforma kajo, kelkaj magazenoj, tenejoj kaj kelkaj malnovaj, eluzitaj arganoj. Nun rekonstruiĝis la varfo, kies longeco etendiĝis ĝis 400 metroj. Finkonstruiĝis nova mezgrada varfo. Krome, estas konstruitaj novaj magazenoj kaj tenejoj, inter kiuj sin trovas interplektitaj relinioj por vagonaroj. Kvar vaporŝipegoj de 3,000-10,000 toneloj povas samtempe alborde ĝi ĉe la varfo. En Qingdao-haveno, estas renovigitaj la



Ĉe Dajren-haveno kargoj estas en- kaj el-ŝipegataj plejparte per maŝinoj

Foto de Jia Cheng-bin

kadukiĝintaj varfoj kaj kajoj. Estis jam riparitaj lastjare la profundakva varfo, al kiu povas rekte alborde ĝi 10,000-tonelaj ŝipegoj.

En la mallonga daŭro de kelkaj jaroj konstruiĝis tra la tuta lando 54 varfoj kaj pli ol 70,000 kvadrataj metroj da magazenoj.

Antaŭenmarŝo al Mekanikigo

Dum ĉirkaŭ unu jarcento en la malnova socio, la ŝarĝportistoj ĉe la kajoj vivis terure mizeran vivon. La pezaj sakoj, ŝtalstangoj, ferplatoj kaj lignaj kestoj premadis sur iliajn ŝultrojn dum la tuta vivo. Pro ilia peza laborado kiel bovoj kaj ĉevaloj, oni nomis ilin "kulioj", t.e. mizeraj pez-laboruloj. Sed hodiaŭ la peza laboro estas paŝon post paŝo plenumata anstataŭe per maŝinoj kaj la varflaboristoj jam fariĝis iliaj mastroj.

Escepte de Dajren-haveno, la mekanikigo de ŝarĝado en niaj aliaj havenoj komenciĝis nur en la tria jaro de la Unua Kvinjara Plano (1953-1957), Kaj nun la havenoj de la tuta lando havas entute 1,500 maŝinojn. Formiĝis kaj kreskadas mekanika brigado el 4,000 homoj. Anstataŭ homforto, la proceso de en- kaj el-ŝarĝado kaj transportado de kargoj en la ses grandaj havenoj hodiaŭ plenumiĝas plejparte per levaparatoj kaj aliaj malgrandaj maŝinoj. Laŭ statistiko la laboroj plenumataj per maŝinoj ĉe la maraj havenoj jam atingis 39.7%, kaj tiu de Dajren-haveno 63%. La duan lokon okupas Zhanjiang-haveno, kiu estas ekipita per dek arganoj, kiuj povas levi kargon de kvin ĝis dek tunoj kaj estas elektre movataj. La magazenoj de Zhanjiang-haveno interligiĝas kun fervojo. Ĉiu magazeno havas tegmentan koridoron sam-nivelitan al la fervojo, ebligante rektan en- kaj



Nokto ĉe Zhanjiang-haveno

Foto de Zhao Mu-zhi

de-ŝarĝadon de kargoj, inter la magazeno kaj vagonaro per elektra transportilo. Iu varf-laboristo diris: "Dank' al maŝinoj, nia vivo plilongiĝos je 30 jaroj."

Zorgemo al la Pasaĝeroj

En malnova Ĉinio estis proverbo: "Mil tagojn ni pasigas en hejmo komforte, eĉ horon sur voj' malfacilon renkontas." Efektive en la pasinteco, oni devis longe atendi por enŝipiĝi sur varfo sub la libera ĉielo, spitante la varmegon en somero aŭ la malvarmegon en vintro, kaj iafoje la atendado daŭris eĉ por kelkaj tagoj kaj noktoj. Lastfoje mi vizitis atendejon ĉe kajo de Dajren-haveno. Ĝi estas luksa salonego, kie senzorge sidas atendantaj pasaĝeroj, interbabilante aŭ legante librojn, dum la afablaj kaj fervoraj laborantoj zorgeme akceptas alvenantajn pasaĝerojn kaj pacience donas informojn, klarigojn aŭ konsilojn al ĉiuj petantoj. Ĉe kelkaj havenoj oni povas nun mendii per telefono ŝipbiletojn, kiujn la ŝipstacio tuj alportigas al la loĝejo de mendintoj.

La havenoj ankaŭ multe zorgas pri la laborprotektado de la laboristoj. Ĉe ĉiu varfo estas suifce vasta ripozejo aŭ laboratendejo por la laboristoj. La ripozejo por la nokte deĵorantaj ŝarĝportistoj en la diversaj varfoj de Ŝanhaj-haveno tre similas al hotelo, kie troviĝas multaj

puraj kaj komfortaj litoj, sur kiuj la portistoj de nokta deĵoro povas ĝui dolĉan dormon. Kantono estas pluvoriĉa urbo, sekve ĉiu laboristo de Huangpu-haveno estas provizita per pluvmantelo. La administracio ankaŭ ekipis la laboristojn per venensirmaj vestoj, kaŭĉukaj gantoj, ventoŝirmaj okulvitroj, venensirmaj buŝumoj ktp., plene efektivigante la ĉiufankan zorgemon de la ŝtato al la laboristoj.

Apud la pli kaj pli multiĝantaj aferoj por kolektiva bono de la havenlaboristoj faritaj de la havena administracio, kiel ekzemple kluboj, publikaj manĝejoj, kuracejoj, infanvartejoj, banejoj, barbirejoj ktp., ĉie ĉe la varfoj stariĝis lernejoj por ilia klerigado. La plejparto de la laboristoj jam ĉesis esti analfabetoj, dum kelkaj el ili eĉ eniris universitaton.

Gastamaj Havenoj por Paca Komercado

La ses grandaj havenoj de nia lando nun akceptas ĉiam pli multe da komercaj ŝipoj el diversaj landoj tra la tuta mondo. Ĝis nun la Nova Haveno de Tanggu jam akceptis komercŝipojn el la jenaj landoj: Sovetunio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Hindio, Britlando, Francio, Japanio, Nederlando, Danlando, Norvegio, Greklando, Egiptio, Turkio, Italio, Svislando, Panamo kaj Okcidenta Germanio. Ŝanhaj-haveno havas transportan interrilaton kun 36 landoj kaj meznombro 5 eksterlandaj komercŝipoj en- aŭ el-haveniĝas ĉiutage. En 1957, Qingdao-havenon vizitis ŝipoj el dekkelkaj landoj, inkluzive Britlandon, Japanion, Italion, Svislandon ktp. Komercŝipoj el 29 landoj vizitis Dajren-havenon. En la nuna tempo, Zhanjiang-kaj Huangpu-havenoj estas plej multe frekventataj de fremdlandaj ŝipoj.

Inter la fremdlandaj maristoj kaj la ĉinaj portistoj jam stariĝis profunda amikeco. Ŝipanoj el ĉiu ajn lando estas kore bonvenigataj. Kiam iu eksterlanda vaporsipo estas forveturonta de la varfo, ni povas ĉiam vidi, ke la fremdaj ŝipanoj kaj la ĉinaj laboristoj estas varme mansvingantaj por adiaŭi unuj la aliajn, kaj laŭtkriante, "paco kaj amikeco!"

Tradukis Nojo Lo

Guan Han-qing Vaste Memorata en Ĉinio

La Tutmonda Packonsilantaro decidis ĉijare memori la 700-jaran datrevenon de la verkaktivado de la granda ĉina dramverkisto Guan Han-qing.

Li estis popola dramverkisto en la 13-a jarcento, kaj spirite granda batalanto kontraŭ la feŭdisma kaj fremdnacia regado. Pri liaj vivo kaj verkado oni informiĝu el la front-artikolo de la lasta numero de nia gazeto. La memorigan agadon en nia lando prizorgas speciala komitato, kiun partoprenas Ĉina Pacdefenda Komitato, Ĉina Dramista Ligo kaj aliaj kulturaj kaj literaturaj organizoj. Je la 28-a de junio la komitato okazigis memorigan solenon. Ĝin ĉeestis pli ol 1,400 personoj, inkluzive fame konatajn literaturistojn, kulturajn laborantojn, pacdefendantojn kaj diverslandajn diplomatojn en Pekino. Malfermiĝis samtage ankaŭ la ekspozicio pri Guan Han-qing en la Malnova Imperiestra Palaco. La saman vesperon komenciĝis la jubilea teatra semajno. La unua prezentita estis la nova teatraĵo "Guan Han-qing" antaŭ nelonge verkita de la fama dramverkisto Tian Han. Sekvis en la semajno serio da prezentadoj de

la dramoj de Guan Han-qing. Sole en Pekino 18 teatraj trupoj partoprenis la prezentadon. Kaj en la pli malpli grandaj provincaj urboj tra la tuta lando, oni havis ankaŭ similajn memorigajn prezentadojn. Laŭ nekompleta statistiko ĉirkaŭ 1,500 profesiaj teatraj trupoj per pli ol 100 teatraj formoj prezentis la verkojn de Guan Han-qing. Ankaŭ la Ĉina Poŝto partoprenis tiun memorigan agadon, per eldono de poŝtmarkoj honore al li.

Krome, la Memoriga Komitato organizis ankaŭ en la kulturaj rondoj studkonferencojn pri liaj verkoj kaj popularajn prelegojn al la publiko. Estas eldonitaj "Verkaro de Guan Han-qing", "Scen-bildoj de Dramoj de Guan Han-qing" kaj en angla lingvo "Elektitaj Dramoj de Guan Han-qing", en kiu troviĝas 8 plej reprezentantaj el liaj verkoj. En multaj teatraj, literaturaj gazetoj kaj grandaj ĵurnaloj ankaŭ aperis specialaj numeroj aŭ rubriko pri la eminenta dramisto. Jam du el liaj verkoj estis filmigitaj. Unu el ili "Preĝo al la Luno" jam prezentiĝas nun en la kinejoj kaj la alia "En la Apudrivera Laŭbo" pretiĝos baldaŭ.

H. F.

Lu Sheng:

Prospera Metiindustrio

HODIAŬ, oni povas trovi ofte metiejojn sur stratoj, ĉu brumovemaj ĉu kvietaj en niaj urboj, grandaj kaj malgrandaj. Kaj, la nomoj kaj enhavoj de tiuj ĉi metiejoj tute diferencas de tiuj de la estintaj. Ili ĝenerale portas nomon de produkta kooperativo, dum tiuj de pli malgranda skalo tiun de koopera grupo. Ĉar, ekde 1956, jam organiziĝis tra la tuta lando pli ol 92 procentoj de la metiistoj de diversaj profesioj en pli ol cent mil produktaj kooperativoj aŭ kooperaj grupoj. Ili kolektive produktas, dividas inter si la laborojn kunordigite, kaj havas komercajn rilatojn kun la ŝtataj aŭ kooperativaj organizoj komercaj.

Laŭ la statistiko, troviĝas nun en la tuta lando ĉirkaŭ 20 milionoj da metiistoj, el kiuj 8 milionoj sin okupas ekskluzive pri la propra profesio, ne praktikante ian ajn kromlaboron. Ili produktas ne malpli ol dek mil specojn da produktaj, de

simplaj butonoj kaj harpingloj ĝis precizaj instrumentoj industriaj kaj kuracaj, de simplaj kaj fortikaj bambu- kaj pajl-plektaĵoj ĝis delikataj kaj

Chang Gui-lu kontrolanta vitrajn vinberojn

Foto de An Kang




belaj metiartajoj, kiaj klaŭzonoj, eburskulptaĵoj, brodaĵoj k.t.p. Krom tio, en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj sin trovas multnombraj, diversaj servaj metioj kiaj tiuj de biciklaj, kaldronaj, radiaparataj riparistoj k.t.p. Unuj el ili havas sian fiksitajn metiejon, kaj aliaj, migrante ĉe la loĝejoj de la servopetantoj. Iliaj servoj estas nemankebla parto en la vivo de la popolo.

"Metisekretan heredigita al la bofilino, sed ne al la filino" estis malnova tradicio de la metiistoj, kiuj posedis ian specialan metodon aŭ sekretan en sia profesio. Sub la kondiĉoj de individua mastrumado oni volis tiel eviti la minacon de konkurenco kaj sekurigi la vivtenadon de la familio. Ĝuste pro tio, multaj famaj produktaĵoj ofte ĉesis kun la morto de la koncernaj metiistoj. Post kooperiĝo, la maljuniĝintaj metiistoj ĝuas la prizorgon de la ŝtato kaj ne plu maltrankviliĝas pri la vivo de siaj idoj. Multaj famaj maljunaj metiistoj ne plu bezonas "ion instrui kaj ion rezervi al si" de sia arto, kiel ili faris antaŭe. La kvino de Chang Gulin kaj fratinoj konataj en Pekino pro siaj vitrovinberoj, devis rezigni edziniĝon kaj ne permesis aliajn homojn eniri ilian metiejon, por nur konservi la profesian sekretan hereditan de siaj antaŭuloj, sed nun jam aliĝis al kooperativo kaj eĉ instruas metilernantojn.

En la pasinteco, la inter-konkurenco kaj interpuŝo de individuaj metiistoj faris la samprofesiulojn malamikojn. Post kooperiĝo, la antaŭa rilato transformiĝis en reciprokan helpadon kaj kunlaboradon; tiel inter la kooperativoj kiel inter la kooperativanoj, oni interŝanĝas spertojn, kune studas la teknikojn kaj, sekve, sukcesis fabrike multe da novaj produktaĵoj kaj plialtigi la kvaliton. En 1956, la novaj produktaĵoj, kiuj ekaperis en Ŝanhajo kaj Tianjin nombris respektive pli ol 3,000 kaj 2,300, inkluzive precizajn instrumentojn kaj kuracaparatojn.

Antaŭe senokupaj sezonoj estis ĉiam serioza, nevenkebla minaco al la vivtenado de metiistoj. Cirkuleris pro tio la diroj: "Ruĝiĝas de sorgo la

Pekino Gravuris metiartisto Huang Heng-song



kapo, vagadas forĝisto tra l' strato." "Plugiloj en kamp' ekfunkcias, lignajist' tuj seniluzias." Sed nun, sub la unuigita mastrumado de la ŝtato, la produktado de metiistaj kooperativoj kaj kooperaj grupoj jam estas envicigitaj en la produkta plano de lokaj industrioj. Iliajn produktaĵojn aĉetas aŭ vendas la ŝtataj kaj kooperativaj magazenoj. Tio garantias la konstantecon de la produktado kaj enspezoj de la metiistoj, senigante al ili la minacon de sezona senokupateco.

Sekve de tio, ilia produktado grandpaŝe disvolviĝas. Ne malmultaj el ili jam duone aŭ tute mekanikizis la produktadon. En la tuta lando tiaj kooperativoj nombras nun pli ol 2,000. Kaj pli multaj ankoraŭ sekvos paŝon post paŝo la saman vojon.

La mirindan rapidecon de antaŭenpaŝo de la metiindustria produktado, oni dankas ĉefe al ĝia liberigo el individua mastrumado.

En 1945, la unua jaro post kooperiĝo la manlaboristoj de la tuta lando jam plenumis la unuan kvinjaran planon, t. e. je unu jaro pli frue ol la tempo difinita. La produkta kvanto de tiu ĉi jaro estas 57% pli alte ol tiu de 1936, la rekorda jaro antaŭ la dua mondmilito. Kaj la jaro 1957 ankoraŭ superis tiun de 1956 je ĉirkaŭ 10%.

La metiindustriaj kooperativoj de ĉiuj lokoj plenforte produktas diversajn terkulturajn instrumentojn kaj starigas ĉie retojn de riparejoj por subteni la terkulturan produktadon. En 1956, al ĉiu terkulturista familio ili produktis meznombro po pli ol du terkulturaj instrumentoj, krom la sennombraj riparitaj.

En malnova Ĉinio, metiistoj ĉiam suferis de la "kvar mankoj": mankoj de manĝaĵo, vestaĵo, ĉiutagaĵo kaj kuracrimedo. La situacio ŝanĝiĝis nur post kiam ili estis kolektive organizitaj. Ĉirkaŭ 90% el ili laborgajnis en 1956 pli ol antaŭe. La meza salajro de ĉiuj kooperativaj membroj pliiĝis je 66% kompare kun tiu en 1952. Nun en la metiindustriaj kooperativoj de ĉiuj grandaj kaj mezaj urboj, kaj de parto de la urbetoj jam efektiviĝis la kuraca subvencio; en iuj eĉ senpaga kuracado; oni ricevas subvencion ankaŭ pro malsano kaj akuŝo. Pasis senrevne por la metilaboristoj jam la tempo, en kiu "buŝo senlaboras kun la manoj". Krome, ĉe multaj kooperativoj fondiĝis ankaŭ infanvartejoj bebenutraĵoj ĉambroj, kontraŭanalfabetaj kursoj postlaboraj lernejoj kaj diversaj kulturaj, amuzaj kaj gimnastikaj organizaĵoj.

En la pasinteco, la metilaboristoj okupis tre malaltan socian pozicion tute neglektate, sed nun en nur iliaj vivopanoj estas garantiataj, multaj el ili estas elektitaj kiel membroj de diversrangaj kongresoj de popolaj reprezentantoj aŭ politikaj

У/картинки не найдены
У/картинки не найдены

konsiliĝaj konferencoj, senpere partoprenante la ŝtatajn aferojn.

Dum la lastaj jaroj, la ŝtato asignis fondusojn kaj elspezojn por la metiindustrio, kiuj sumis pli ol 130 milionojn da jŭanoj. Kaj la ŝtataj bankoj donis al ili kun longa aŭ mallonga templimo malaltintere-zajn pruntojn, kiuj sole en 1956 sumiĝis 380 milionoj da jŭanoj. Rilate al la impostoj, la ŝtato favoras per pli malalta tarifo aŭ impostliberigo al la nove starigitaj metiindustriaj kooperativoj aŭ kooperaj grupoj. Ŝtataj komercaj organizoj donas al ili ankaŭ subtenadon tiel en provizado de materialoj kiel en vendado de iliaj produktaĵoj. Ĉio ĉi tio multe helpas la prosperan disvolviĝon de la metiindustrio.

Elĉinigi Sumino



Maljuna majstro Chen Long-xiang publikigas sian sperton en farado de lakvazoj

Foto de Zhao Su-fang

Yan Shu-gui:

Batalo kontraŭ Sabloventego

LAŬLONGE de la 4,000 liojn longa sabloventega linio etendiĝanta de Yanchi-gubernio sur Ningxia-ebenejo en la oriento, tra 25 gubernioj kaj urboj (Minqin, Jiuquan k.a.) ĝis Hala-lago de Dunhuang-gubernio ĉe la okcidenta ekstremo de la Riverokcidenta Koridoro, miloj kaj miloj da kamparanoj estas nun konstruantaj verdan grandan muron. Sur la are starantaj sablomontetoj, ĉe la granda Gobio kaj sur la salalkalaj sablejoj, ili decidis supervenki la sabloventegon, kiu suferigadis la popolon dum tiom da jarcentoj ĝis hodiaŭ, kaj transformi la gobiojn en oazojn kaj la dezertojn en fekundajn agrojn.

Le Feroce Flava Drako

Jam de jarmiloj la mongola dezerto kuŝanta norde de tiu ĉi linio seninterrompe atakadas homojn, suden etendiĝas kaj englutas 4 ĝis 40 metrojn ĉiujare. Tuj kiam ekblovis ventego, la ruliĝanta flava sablo kovris la ĉielon kaj kaŝis la sunon. La feroce sabloŝtormo detruis agrojn, irigaciajn kanaletojn kaj vilaĝojn. La popularaj frazoj inter la tiea loĝantaro "sablomontetoj vilaĝojn entombigas; sabloventegoj agrojn dezertigas", eldiris la suferojn de miloj kaj miloj da kamparanoj. Estas ja nature, ke oni nomis la sablomontetojn "sablotigro" aŭ "flava drako"! Laŭlonge de tiu ĉi sabloventega linio, 100,000 hektaroj da agroj estis

damaĝataj de la sabloventega katastrofo ĉiujare. Nur en Minqin-gubernio en 1950 sole, subsabliĝis 10,000 hektaroj da agroj. En la regiono de Jingbianyi en Wuwei-gubernio la sabloŝtormoj englutis pli ol 47,000 hektarojn da agroj kaj ŝtopis kanaletojn irigaciantajn areon de 2,700 hektaroj dum la lastaj 40 jaroj. Hodiaŭ oni povas ankoraŭ trovi en la dezertoj ruinaĵojn de multaj urbomuroj kaj domoj. Sub la persekutado de tia katastrofo, tiom da homoj estis devigitaj forlasi kun larmoj siajn hejmojn kaj posedaĵojn por rifuĝi en forajn lokojn tute nekonatajn kun siaj familianoj.

Depost la liberiĝo la partio gvidis la popolan-ojn loĝantajn laŭlonge de la linio brave batali kontraŭ la sablaj dezertoj de la granda Gobio, efektivigante vicon da agadoj kiel plantado de kontraŭventaj heĝoj, fiksado de sablomontetoj, kreskigo de arboj kaj herboj, k.a. por venki la sabloventegon.

Sed la aktiva militiro kontraŭ la sabloventego ja ankaŭ trapasis eksterordinare zigzagan vojon. En la komenco, kiam la alvoko por fiksado de sablo kaj kulturo de forstoj estis elmetita, multaj kamparanoj hezitis kun dubo. Kelkaj opiniis: "Tio estas Sankta Sablo. Kiel homoj povus ĝin fiksi?" Aliaj diris: "Flava Drako! Flava Drako! Ju pli homoj ĝin ofendas, des pli ilin ĝi malbenas! La ofendaŭdaco alportos al ni nur pli da malfeliĉo."

k) ĉu ni elfosu = ĉirkaŭŝanĝi ne menciigi? / ĉu ni elfosu = ĉirkaŭŝanĝi ne menciigi? / ĉu ni elfosu = ĉirkaŭŝanĝi ne menciigi?
x) kial ni ne iru antaŭen = ĉirkaŭŝanĝi ne menciigi? / kial ni ne iru antaŭen = ĉirkaŭŝanĝi ne menciigi?
x) oni nuligis = anula

Kontraŭ tiuj malfacilaĵoj multaj komunistoj manifestis sian sentimecon kaj persiston, pliaktivigante la popolamasojn al kuraĝaj provoj per siaj modelaj agadoj.


Ĉiam Antaŭen, sed Ne Returnen

En 1952, iu irigacia kanaletoj en Jinta-gubernio estis parte surkovrita de sablomonteto. La akvomastroma fako de la guberniregistraro decidis rutine elfosi novan fluejon ĉirkaŭirantan la sablomonteton. Esplorinte la problemon, iu kadro Ma Neng-Yuan diris al la kadroj de la akvomastroma fako: "Se la sabloventego ripetus sian diablajn la venontan jaron, ĉu ni elfosu alian novan kanaleton? Kiam estos la fino, se ni ĉiujare cedadas al la sablo? Kial ni ne iru rekte antaŭen al ĝi kaj batalu kontraŭ ĝi vidalvide, kaj vidu, ĉu ni povos ĝin fiksi por ĉiam?" Tiu ĉi senprecedenca propono kaŭzis akran disputon en la kunsido de distriktoj kaj vilaĝaj kadroj. Sed finfine oni decidis kovri la sablomonteton per tero kaj planti arbojn.

Tamen, la popolamasoj estis ankoraŭ ne konvinkitaj en tiu tempo. Tial multaj el la laborantoj el la vilaĝoj por plenumi la taskon estis nur maljunuloj kaj infanoj, kaj kelkaj venis eĉ sen necesaj laboriloj. Post tritaga laborado la sablomonteto kun areo de 60 muoj estis duone kovrita per loeso. Vidinte la rezulton kaj fortecon de sia kolektiva laborado, la popolamasoj ekentuziasmiĝis kaj plifirmiĝis ilia kuraĝo kaj memfido por venki la naturan katastrofon. Multaj junuloj kaj mezaĝuloj ekpartoprenis la laboron kaj multaj ŝanĝis sian pasivan sintenon kaj kunportis kun si ŝovelilojn kaj teraj-korbojn. Fine en la daŭro de 7 tagoj, estis plene kovrita la tuta sablomonteto, ĉirkaŭ kiu arboj estis plantitaj. Oni nuligis la antaŭan planon fosi novan fluejon por anstataŭi la malnovan. La konstruo de la ŝirma forstzono 4,400 liojn longa laŭlonge de la sabloventega linio komencis la unuan paŝon kun tia luktado.

Kontraŭ-venta forstozono en Dengkou-gubernio

Foto de Yuan Ru-sun



Novaj Metodoj por Bridado de Sabloventego

Ekde la jaro 1953, ĉiujare kreskadas la nombro de la partoprenantoj en la sablofikado kaj forstokulturado kaj pligrandiĝas la skalo. Ankaŭ la spertoj de la popolamasoj en la batalado kontraŭ la naturo multe pliriĉiĝis. La kamparanoj de Minqin-gubernio kaj Anxi-gubernioj kreis diversajn novajn metodojn por haltigi la antaŭendrivadon de la ĉiam delokiĝanta sablo: kovrado per malseka teraĵo, ŝmirado de koto, k. c. Tiuj de Zhongwei- kaj Zhongnigubernioj eltrovis post provoj en praktiko tutan procedaron de forstplantado: starigi defendan linion laŭlonge de la rando de la sablo, dislokigi forstajn punktojn en la sablejo, interligi la punktojn en retojn, fiksi la sablon per la retoj. La kamparanoj loĝantaj okcidente de la Flava Rivero resumis el spertoj la forstkulturan metodon de ĉirkaŭbaro ĉe la antaŭo kaj malantaŭo por protekti la arbojn, reformante la naturon per fizikaj rimedoj. Iu arbo-kulturejo en Minqin-gubernio akiris sperton plialtigi la viv-procenton de arboj sur seka tero laŭ la principo senefikigi la alkalon kaj kulturebligi la grundon per sablo. La Jiayuguan-a Agrikultura Kooperativo en Jiuquangubernio elprovis unuapaŝan metodon por verdigi sablejojn. Ĉiuj tiuj ĉi kreo ege akcelis la aktivecon de la popolamasoj por fiksi la sablon per forstplantado. Ĝis la lasta jarfino, laŭlonge de la tuta linio pli ol 80,000 hektaroj da forstoj estis kulturitaj, sur pli ol 300,000 hektaroj la sablejoj estis ĉirkaŭ-baritaj kaj herboj kaj arboj kreskigitaj, kontraŭ-ventaj heĝoj kun longeco entute de pli ol 1,400 kilometroj estis starigitaj kaj pli ol 14,800 muoj da sablomontetoj estis terkovritaj. En tiu ĉi giganta lukto jam aperis kelkaj distriktoj kaj kooperativoj, kiuj sukcesis fundamente bridi la sabloventon. Ekzemple, antaŭ la liberigo en Sushan-distrikto de Minqin-gubernio, 14 vilaĝoj estis sub-sablitaj, 800 muoj da agroj sablokovritaj, aliaj 1,000 muoj grave damaĝitaj, al 70% de la kamparanoj mankis nutraĵo por duona jaro kaj 62 familioj devis rifuĝi aliloken. Nuntempe la 1,800 muoj da agroj refariĝis tute kultureblaj. Plie, nove kultureblas 300 muoj, kiuj alportas jaran pliprodukton de 360,000 ĝinoj da greno. Pro la forigo de la katastrofo, la jara produkto po muo de aliaj agroj ankaŭ altiĝis je 115 ĝinoj. En Beichi-vilaĝo de Yongchang-gubernio, la rikoltajoj de duono el la 2,800 muoj da agroj estis ĝenerale blodamaĝita de sabloventego antaŭe. Hodiaŭ la meza jar-produkto po muo altiĝis de 100 ĝinoj en 1952 ĝis 342 ĝinoj. Krome, la areo de agroj en tiu ĉi vilaĝo pligrandiĝis je pli ol 1,300 muoj.

Ye Ming-zhi:

La Vento kaj Pluvo Kriegas (Windsong)

La vento kaj pluvo kriegas,
demandas, ĉu timo min regas.
Ho, mi, kamparan' unuopa
Mizeras, se ŝtormas, pluvegas!

Je 1' tago unua ekŝtormas, pluvegas.
Ekmanĝo — remetas mi mian manĝilon;
ekdormo — subite min zorgo ekvekas!
Suferas la kor' maltrankvilon.

Je tago la dua plu ŝtormas, pluvegas,
min tage okupas kontrolo
kaj nokte gardad' sur la digo —
fariĝas mi kota idolo!

Je tago la tria ŝtormpluvo teruras,
kaj ĉiujn la digojn disŝiras, detruas,
al mi la pajlsegmenton forblovas
kaj ankaŭ fajrejon renversas —
nur migri ĉielranden kun l' idoj mi povas!

La vento kaj pluvo kriegas,
demandas, ĉu timo min regas.

Nek pluvo kaj nek uragano
timindas al mi, kolhozano.

Konstruis ni, antaŭ-hieraŭ
remparon el kupro kaj ŝtalo;
nek je la tertremo nek je mont-renverso
minacos al ĝi la disfalo.

Hieraŭ pretigis ni digon
altega, ĉieloskrapanta,
eĉ se diluvakv' altoventus,
ĝin glutos la digo giganta.

Hodiaŭ konstruis ni akvkonservejon —
ja ĝia buŝego larĝegas kiel maro.
Nu, vento kaj pluvo, vi venu laŭplaĉe!
Ja oros rikolt' en venonta la jaro. *как урожай*
Eĉ se la ĉielo kaj 1' ter' renversigus
ni restos sen ĝen' kaj sen ia amaro.

Elĉinigis Laŭlum

Verda Granda Muro Finkonstruiĝos en 3 Jaroj

Laŭ la plano de forstokulturaj instancoj, antaŭ la jaro 1962 konstruiĝos sur la tuta sabloventega linio granda ŝirma forstzono, 2,200 kilometrojn longa, 1,5 kilometrojn larĝa kun areo de 330,000 hektaroj; 94 ĉefaj kaj branĉaj forstzonoj entute 3,400 kilometrojn longaj kaj kun areo de 340,000 hektaroj; kaj agroprotektaj forstretoj de 10,000 hektaroj. Kiam tiu ĉi plano estos efektivigita, pliiĝos laŭlonge de la linio 10,000,000 muoj da agroj, kiu produktos ĉiujare 3,000,000,000 ĝinojn da greno. La 100,000 hektaroj da agroj konstante damaĝitaj en la pasinteco liberiĝos por ĉiam el la diablaj manoj de la sabloventego kaj pliproduktos ĉiujare grenon je 30%. Samtempe, la plantitaj arboj kaj herboj donos en 1967, krom

granda kvanto da konstruaj materialoj, 1,500,000 tunojn da hejtligno, 5,000,000 ĝinojn da fruktoj kaj 8,000,000 tunojn da verda sterko. La forstokultura laboro sur la sabloventega linio estas disvolviĝanta nun kun senprecedenca rapideco. Multaj distriktoj decidis finkonstrui siajn partojn de la verda granda muro en 3 jaroj. La forstokultura areo en la kuranta jaro eble atingos pli ol 1,000,000 muojn, kiuj egalas al 80% de la tuta areo forstigita en la 8 jaroj post la liberiĝo. La traktoroj de la du ŝtataj mekanikizitaj forstokulturejoj tuj funkcios por la unua fojo sur la maldense loĝata zono. En la baldaŭa estonteco, sur la sablejo, "kiun pro ĝistibia ensabliĝo timas trapasi kaj homoj kaj bestoj" aperos arkadoj de freŝverdaj vinberujoj kaj fruktoĝardenoj en kiuj peze pendos dikaj fruktoj.

Trad. Pandiŝo

PRI KUNĈJU-OPERO

En la Tria Internacia Teatro-festivalo, Parizo, Ĉina Teatra kaj Danca Ensemblo prezentis unuafoje al eŭropaj artistoj kaj rigardantoj unu el la plej malnovaj kaj elstaraj specoj de ĉina opero — tiun de Kunĉju. Por konigi ĝin al niaj legantoj ni publikigas la sekvantan artikolon skribitan de la famkonata Kunĉju-aktoro.

— La Red.

EL ĉinaj teatraj artoj, la bone konata de fremdaj amikoj estas la Pekina opero. Sed Ĉinio estas tiel vasta en teritorio, ke ĝi havas operojn diversajn en speco kaj formo. La Kunĉju-opero estas alia famkonata speco de opero apud la Pekina.

La Deveno de Kunĉju-opero

Kunĉju (Kun-ario) ricevis sian nomon de la deven-loko, ĉar ĝi adoptis novan kantmanieron kaj disvastiĝis en la komenco de la dekseca jarcento en la regiono de Kunshan-gubernio, Jiangsu-provinco. Antaŭ tio, tra la tuta lando jam vaste furoris en diversaj lokoj multaj operaj kantmanieroj, kiujn ĝenerale oni povas distingi en du grandaj sistemoj, la suda kaj norda. Sed iliaj melodioj estis simplaj kaj monotonaj; la muzikaj instrumentoj uzataj estis limigitaj en frapaj instrumentoj kiel tamtamoj, tamburoj k. a. Oni malofte uzas mildsonajn kaj delikatajn blovaŭ kord-instrumentojn. Antaŭ ĉio, Kunĉju faris grandan reformadon en kantmaniero kaj muzika akompano. La iniciatinto de la reformado estis la granda muzikisto kaj komponisto Wei Liang-fu.

Yu Zhen-fei (la dekstra) ludanta la rolon de rifuĝanta imperiestro Jian-wen

Foto de Yang Putao



En sia juneco, Wei Liang-fu ellernis la kantmanieron de la melodioj de la nordo; ĝuste tiam, kiam li transloĝiĝis al Kunshan-gubernio, la kantmaniero tiea disvolviĝis al nova etapo, do li sin fordonis al la studado de la kantmaniero de la sudaj melodioj, kaj penis ĝin plibonigi por ke ĝi estu ĉarma por la oreloj.

Fine, kunlaborante kun siaj amikoj, Wei Liang-fu per reformado de kantmaniero kaj muzika akompanado, alprenante dize, ŝjaŭ, ŝeng, piba* ktp. en la orkestron donis tre plaĉan efekton. La nova plibonigita kantmaniero tuj disvastiĝis en tre mallonga tempo al la najbaraj lokoj de la gubernio, inkluzive Suzhou-n.

Teatraj verkistoj de Kunĉju-opero

La disvastiĝo de la nova kantmaniero, kompreneble altiris la atenton de la teatraj rondoj. La loka dramverkisto Liang Bolong komencis verki teatraĵojn por Kunĉju-opero. Li verkis la famkonatan dramon "Wan Sha Ji (Gazo-lavado)", kies subjekto estas rakonto de okazintaĵo pri Xi Shi en la epoko de Chunqiu (722-481 a. K.). La dramo rakontas: la regno Wu venkis la regnon Yue, kies reĝon oni kaptis kaj enkarcerigis. Por savi la reĝon, la ministroj de la regno Yue oferis la belulinon Xi Shi al la reĝo de Wu, por ke ŝi delogu lin. Kaj rezulte, la reĝo de regno Yue povis reveni al sia hejmlando, kiu reveninte dediĉis sin al venĝo al la malamiko, plibonigis la regadon kaj ekzercis siajn soldatojn per ĉiuj fortoj kaj klopodoj. Finfine li sukcesis pereigi la regnon Wu.

La teatraĵo estis verve verkita kaj la opera prezentado estis laŭ la nove reformita kantmaniero de Kunĉju. Ĝi rikoltis brilan sukceson kaj faris grandan sensacion en la sudo de Yangzi-rivero. En la dua duono de la dekseca jarcento, Kunĉju ne nur jam rapide furoris en la provincoj Jiangsu kaj

Zhejiang, sed ankaŭ en la granda urbo de la nordo, Pekino. Tio markis, ke Kunĉju jam paŝon post paŝo disvastiĝis kiel en la sudo tiel ankaŭ en la nordo, kaj alproksimiĝis al sia komenca periodo de prosperado.

Ĉirkaŭ la deksepa jarcento, en ĝia prospera periodo, aperis multaj dramverkistoj por Kunĉju, interalie Tang Xian-zu (1550-1671), Hong Sheng (1645-1704), Kong Shang-ren (1648-1718) k.t.p., ili estis ĉiuj eminentaj teatrajverkistoj en la historio de ĉina literaturo.

“La Peoni-pavilono — Rakonto pri Reviviĝo” skribita de Tang Xian-zu, okupis plej altan lokon. La dramo priskribis junulinon, Du Li-niang, kiu melankolie mortis pro la neakirebla libereco de geedziĝo. Tamen, dank’ al sia fideleco kaj la profunda amobstino de sia amato, ŝi fine reviviĝis kaj feliĉe vivis kun sia edzo. La verkisto laŭde pri-kantis la pretermortan forton de amo, pasie vipis la rigidan moralinstruon de la feŭdala socio, subtile reliefigis la puran animon de la gejunuloj. La teatraĵo estas vivoplena en intrigo, profunda en penso kaj eksterordinare lerta en strukturo. Plie la alta beletristika talento de la verkisto tiel disvolviĝis en ĝi, ke la tuta teatraĵo fariĝas bela mondo de poezio.

“La Palaco de Longvivo” de Hong Sheng, kiu surscenigis la tragedion de amo inter imperiestro de Tang-dinastio (618-907 p.k.) kaj Yang Yu-huan dum milito; “La Ventumilo de Persikfloroj” de Kong Shang-ren, kiu priskribis la pereon de la patrolando, kio okazis 3-4 jarojn antaŭ la naskiĝo de la aŭtoro, estas aliaj ĉefverkoj menciindaj. Ĉiuj tiuj ĉi teatraĵoj, ĉu en dramaturgio ĉu en kanto kaj muziko, montris ke Kunĉju jam atingis maturecon.

De Prospero al Malprospero

Tamen, dum pli ol ducentjara disvolviĝo al matureco, Kunĉju fariĝis iom post iom formulisma en prezentado, la tiel nomata nova ĝia kantmaniero ankaŭ montriĝis iom malnoviĝinta kaj malvigla, plue, multaj nobeloj kaj beletristoj salonaj pli preferis pompecon en la lingvaĵo ol popularigon de la dramo en sia verkado. Tiuj ĉi tri difektoj, pli kaj pli, evidentiĝis kun la tempo. Ĝis la fino de la dekoka jarcento aperis nova popola teatraĵo — *Lŭantan*, kiu konkuris kun Kunĉju por akiri pozicion en popolamasoj. Ĉar ĝi venis el la popolo kaj superis Kunĉju-on en tiuj ĉi tri punktoj, rezultiĝis ke la lasta estis pason post paŝo forpuŝita. En la kvardekaj jaroj de la dudeka jarcento,

Kunĉju tute velkis, eĉ en sia naskiĝloko — Suzhou kaj ĉirkaŭaĵo.

La Renovigo de Kunĉju-opero

Post la fondiĝo de la Respubliko de Popola Ĉinio, ĉiuj specoj de teatraĵoj en la tuta lando ekhavis plej favorajn kondiĉojn por florado, la mortanta Kunĉju ankaŭ ricevis revivigon. La “Dek Kvin Ĉenoj da Moneroj” reviziita kaj prezentita de la Kunĉju-a Teatra Trupo de Zhejiang-provinco en 1956, akiris grandan sukceson pro la renovigo de la enhavo, plibonigo de la melodio kaj pro la lerta utiligo de scena dekoraciado, kostumado kaj lumigado konformaj al la postuloj de la nuna tempo. Kaj la granda sukceso montris al la rondoj de Kunĉju klaran vojon al renovigo. Por eduki novan generacion de Kunĉju-aktoroj, la Ŝanhaja Teatra Instituto, invitis la veteranajn Kunĉju-aktorojn de la sudo kiel instruistojn, kiuj fervore ekzercigis la lernantojn. Dum tri jaroj jam montriĝis rimarkinda rezulto. En 1957, fondiĝis en Pekino la Norda Kunĉju-teatro kiu ofte prezentas tradiciajn kaj renovigitajn teatraĵojn. Tio estas alia nova afero en refflorado de Kunĉju-opero.

Trad. Ŝtemu.

* Ĉinaj muzikiloj, inter kiuj *dize* kaj *ŝjaŭ* pli malpli similas al fluto, *piba* al gitaro kaj *ŝeng* estas ia buŝharmoniko kun tubetaro.

Sceno el “La Peoni-pavilono”

Foto de Zheng Zhen-sun



La Kamparanoj Marsas al

Lernejoj Establita en Surpriza Rapideco

EN Liyang-gubernio, Jiangsu-provino, 82 mezlernejoj (84 klasoj) kaj 166 klasoj de elementaj lernejoj estis establita de la popolo mem en la daŭro de sep tagoj, tiel ke 3,784 lernantoj kiuj jam finis la kursaron de elementa lernejo (inter ili estas enkalkulita ankaŭ junaj kaj plenaĝaj kamparanoj kun egala klereco) kaj ĉiuj 15,228 lernaĝaj infanoj en la gubernio eniris lernejojn. Nun ne nur estas mezlernejo en ĉiu distrikto kaj elementa lernejo ĉe ĉiu agrikultura kooperativo, sed eĉ po ok aŭ naŭ mezlernejoj en kelkaj distriktoj.

Dum Labor-intervalo

Lignogravuraĵo de Zhuang Yuan



La laboroj por likvido de analfabeteco en Liyang ankaŭ disvolviĝas kun sensacio. Antaŭe estis tie pli ol 84,000 analfabetaj aŭ duonalfabetaj junuloj kaj plenaĝuloj, kaj nun ne nur tiuj ricevas lecionojn por legado kaj skribado, sed ankaŭ parto de la maljunuloj komencis similan lernadon. La nombro de personoj, kiuj vizitas lernejojn por analfabetoj, nuntempe estas pli ol 89,000, superante la tutan nombron de analfabetaj aŭ duonalfabetaj junuloj kaj plenaĝuloj je pli ol 5%.

La sukceso atingita en mallonga tempo de sep tagoj, sen elspezo el ŝtata kaso — estas vera afero senprecedenca.

Arda Entuziasmo por Lernado

La leviĝo de ilia politika kaj ekonomia pozicio, kresko de produktado kaj pliboniĝo de la vivo, pli kaj pli instigas la kamparanojn strebi al ŝanĝado de la kultura situacio, por si mem kaj ankaŭ por la dua generacio. Mi aŭdis plurfoje de kooperativanoj tion: “En nia distrikto ni baldaŭ havos traktorojn kaj elektrajn maŝinojn por irigacio, kaj establiĝos ankaŭ fabrikoj. Kion fari, se ni restus postrestantaj en kulturo?” “Niaj infanoj ne plu kuros post bovoj, sed laboros super maŝinoj. Ĉu decas ni kiel gepatroj, ne zorgi pri ilia klerigado?”

Estas unuanima celado de la vastaj kamparanoj, fariĝi klerigita terkulturisto. Kien ajn vi iros, vi trovos similajn devizojn kiaj: “Estu heroo en produkto, kaj modelo en lernado!” Ĉu produkton ĉu lernadon ambaŭ prizorgu; abunde rikoltu, kaj la grenojn kaj la sciojn!” En multaj vilaĝoj oni skribis per kalko sur la muroj la ofte uzatajn vortojn, listigitajn sub la titolo: “Konkuru kaj vidu, kiu ellernos pli multe da vortoj!” Sur la kampoj, apud la vojoj kaj domoj, en la ĉambroj kaj sur la ĉiutage uzataj mebloj kaj agrikulturaj iloj, ĉie estas skribitaj lernataj vortoj kaj kreitaj estas kondiĉoj por memorigo, formiĝas en la kamparano movado de “lernigo de ideografoj per vido de objektoj”.

Eĉ en marto, kiam oni estis tre okupataj pri printempa plugado kaj semado, vi povus ankaŭ trovi, ke kamparanoj kune sidas du- aŭ tri-ope sur la kamporando, dum intervalo por ripozeto, kaj reciproke instruas kaj lernas el la legolibroj, kiujn ili ĉiam portas. Ili bezonas nek plumojn nek paperon; anstataŭe ili skribas per branĉetoj sur la tero. Vespere vi vidus ke ili diligentas ree sub

la Kulturo

la lumo de malgranda olea lampo. Inter ili ne mankas eĉ maljunuloj, kiuj havas 60 aŭ 70 jarojn kaj lernas legadon kaj skribadon, kun malmiopaj okulvitroj.

“Kulturaj” Vilaĝoj Aperas Kiel Fungoj post Pluvo

Por multaj vilaĝoj, “analfabeteco” baldaŭ fariĝos pasintajo. Mi aŭdis multajn rakontojn pri tiuj vilaĝoj kiuj forigis la analfabetecon kaj fariĝis nun “kulturaj”.

Unu el ili estas la vilaĝo Wangzhu, kiu estas kompare pli granda vilaĝo en tiu ĉi distrikto, el 160 familioj. Antaŭ la liberiĝo, pli ol 62% el la junuloj kaj plenaĝuloj estis analfabetoj kaj duon-analfabetoj, kaj nun 81% (124 personoj) el ili povas legi kaj skribi. Pro tiu ĉi grava ŝanĝiĝo, la sfero de la pensado de la kooperativaj membroj multe plivastiĝas, kaj ilia deziro al pli alta klereco ĉiam ankoraŭ pli leviĝas. En la pasinteco, dum pluvaj aŭ neĝaj tagoj, oni kutime kune ludis kartojn, aŭ iris al drinkejo por pasigi la tempon. Sed nun, legado fariĝas iom post iom kutimo pli ŝatata de vilaĝanoj.

En Liyang-gubernio estas multaj tiaj vilaĝoj kiuj rapide aliigis sian kulturan fizionomion, kaj ĉiam ankoraŭ aperas novaj kaj novaj kiel fungoj post pluvo.

Trad. Chen Hou-heng

Belan kalendaron de 1959 “El Popola Ĉinio” donacos al siaj unuaj 6 miloj da abonantoj. Tuj abonu!

Jarkotizo en 1959

Britio, Aŭstralio, Novzelando kaj en landoj de sterlinga regiono	0-8-6	£
Francio	400	F.Fr.
Italio	600	Lire
Japanio	430	Yen
Kanado	1.50	Can.\$
Mez- kaj Sud-Ameriko	1.20	US\$
Svislando	5.00	S.Fr.
Usono	1.50	US\$

En landoj, kie ankoraŭ ne troviĝas niaj perantoj aŭ kunlaborantaj librejoj, oni povas pagi per respond-kuponoj (12 rkp por tutjaro) aŭ egalvaloraj Esperantaj libroj (sed ne poŝtmarkoj).

NIAJ PERANTOJ

- Anglujo:** F-ino F. Parage, 10, Woronzow Rd. St. John's wood. LONDON-N.W. 8.
Brita Esperantista Asocio, 140, Holland Park Avenue, LONDON, W. 11.
- Aŭstralio:** S-ro Fritz Mueller-Sorau, II John St. Petersham, N.S.W.
- Danlando:** Eldonejo KOKO, Randbølvej 4, Kopenhago F.
- Francio:** Labor-Esperantista Federacio, 4, str. Général-Malleterre, PARIS-16e
La Nica Literatura Revuo, 5, Bd. Stalingrad-NICE-A.M.
- Japanio:** Japana Esperanto-Instituto. Hongo Motomati 1-13, Tokio.
- Nederlando:** Universala Esperanto-Asocio, Eendrachtsweg 7, Rotterdam
- Svedlando:** Sveda Laborista Esperanto Asocio, Stureby skola, ENSKEDE, Stokholmo
- Usono:** The Esperanto League for North America, RFD 1, MEADVILLE, PA.

Oi povas aboni EPC-n ankaŭ en jenaj librejoj

(abonantoj de tiuj ĉi librejoj ricevos EPC-n rekte de Guoti Shidian en Pekino)

Albano:	Ndermarjes Shtetnore Botimeve, Tirana
Anglio:	Collet's Holdings Ltd., 45 Museum street, London W.C.1. Central Books Ltd., 37 Grays Inn Road, London W.C.1
Aŭstralio:	A. Keesing, Box No. 4886, G.P.O. Sydney, N.S.W.
Aŭstrio:	Globus-Buchvertrieb, Fleischmarkt 1, Wien 1,
Belgio:	Du Monde Entier, 5, Place St-Jean, Bruxelles
Birmo:	Nan Chio Book Supplier, 178, Fraser Street, Rangoon People's Literature Committee and House, 540, Merchant Street, Rangoon The People Daily 84th Street, Letsaigan Mandalay
Bulgario:	RAZNOIZNOS, Assen 1, Street No. 1, Sofia
Ceĥoslovakio:	ARTIA Ltd., 30 Smecky, Prague II
Danlando:	Land og Folks Boghandel, A/S Bredgade 37, Kobenhavn K
Egiptio:	Al Goumbouria Distributing Co. 5, Nagib el Rihani Street, Cairo The National Publishing & Distributing Co. 5, Sharia Doubreh, Cairo
Finlando:	Kansankulttuuri oy Simonkatu 8, Helsinki
Francio:	Librairie du Globe, 21, rue des Carmes, Paris V
Germanio-Okc.	KAWE, Berlin-Charlottenburg 2 Joachimstahler Strasse Kubon & Sagner, (13a) Furth im Wald, Schliessfach 64 Santo Vanasia GmbH, Streitzeuggasse 7 Kohn Kamalalaya Stores Ltd., 156A, Dharamtalla Street, Calcutta-13
Hindio:	Sin Min Chu Publishing Co. 175, Queen's Road Central
Hongkongo:	KULTURA, Budapest 62, P. O. Box 149
Indonezio:	Nan Sing Coy. Ltd., Pantjoran 12 Djakarta-Kota O.K. Sports & Co., Ltd., 214 Djalan Gadjah Mada, Djakarta-Kota Firma "Rada", Pintu Besar Selatan 3A, Djakarta-Kota
Irlando:	Kaupfclag Reykjavikur og Nagrenis Skolavordustig 12, Reykjavik
Italio:	Libreria Mario Vigna, Via Tovaglie 35, Bologna Editori Distributori Associati, Via Mauro Macchi 40, Milano Libreria Rinascita, Via delle Botteghe Oscure 2, Roma
Japanio:	Daina Cultural Trading Co., Ltd., 2-11, Kanda-Sarugaku-cho, Chiyodaku, Tokyo Far Eastern Book-Sellers, No. 2, 2-chome, Kanda-Jinbocho, Chiyodaku, Tokyo
Kanado:	Progress Sub. Service, 924 King Street West Toronto, Ont.,
Korelo:	朝鮮平壤國際書店總店
Norvegio:	Johan Grundt Tanum, Tidligere Aschehougs Boghandel, Karl Johans gate 43, Oslo
Polando:	ARS POLONA, Warszawa, ul. Foksal 18
Rumanio:	CARTIMEX, Bucharest, P. O. Box 134-135
Svedlando:	Gleerupska Universitets Bokhandeln Lund Gumperts Aktie Bolag, Sodra Hamngatan 35, Goteborg
Svislando:	La Librairie Nouvelle, 18, rue de Carouge, Genève Librairie Rousseau, 36 rue JJ Rousseau, Genève Pinkus & Co., Bucher Such Dienst, Predigerasse 7, Zurich
Urugvajjo:	Ediciones Pueblos Unidos S. A. Colonia y Tacuarembó, Casilla Correo 589, Montevideo
Usono:	Imported Publications & Products, 4 West 16th Street, New York 11, N. Y
Vietnamio:	Phong Sach Bao Ngoai van, 22, Tráng Tiên, HANOI,

Ni atendas kunlaboron de aliaj landaj asocioj kaj gravaj Esperantaj entreprenoj.



Verkita de Liu Chao

LIJIANG-GUBERNIO de Yunnan-provinco estas regiono riĉa kaj bela. Tie troviĝas kuriozaj kaj krutegaj montaroj; fluantaj fontoj blue verdaj kaj kviete bela. Ĉe la nordo de la regiono serpentumas Jinsha-rivero, la supra parto de Yangzi-rivero; la neĝ-kovrita monto Yulong staras dek mil futojn super la marnivelo. Krome, abundaj estas altplataj lagoj kaj malgrandaj ebenejoj nomataj "digoj".

Tie ĉi loĝas la popolo ĉefe de Naŝi-nacio, kiu estas unu el la multaj naci-minoritatoj ĉe la sudokcidenta landlimo de Ĉinio. La Naŝi-nacio estas popolo laborema, brava, fervora kaj gastama. Ilia ĉefa produktado estas agrikulturo. Naŝi-aj virinoj laboras same kiel la viroj. Kostumoj de la viroj tre similas al tiu de la Han-oj, krom aldono de ŝafofela veŝto. La virinaj kostumoj inkluzivas jaketon kaj pantalonon el indiga katuno kun galonita veŝto kaj blanka, multfalda zono. Sur ambaŭ ŝultroj de la jaketo estas surbroditaj rondaj ornamajoj el blanka ŝtofo brodita per silkaj fadenoj.

Ĉe la popolo de Naŝi-nacio vaste konatiĝas multaj tradiciaj festoj kaj legendoj. Unu el ili estas la Torĉo-festo, kiu okazas ĉiujare je la 25-a tago de la sesa monato laŭ la luna kalendaro. (Ĉijare la dato koincidas kun la 10-a de aŭgusto). En tiu tago, kiam vesperiĝas, tuj ekfloras torĉoj kiel flamantaj arboj kun arĝentaj floroj; ĉie aspektas kiel fajro-mar. Junuloj kun alte levitaj torĉoj jen dancas jen kantas tra la kamparo.

Kio estas la origino de ĉi tiu festotago? Sube estas unu el la legendoj rakontataj de la naŝi-oj

Longlonge antaŭe, tiel iras la mito.

Iun tagon, Dio Yuhuang sentis sin ĉagrenita pro tro longa restado en sia Ĉiela Palaco. Li ordonis, ke la firmefermita pordego de la ĉielo estu malfermita, por ke li povu sin distri per rigardo al la naturaj vidaĵoj de la homa mondo.

Observante kun atento, li rimarkis, ke la mondo pleniĝas je bluaj montoj kaj verdaj arboj, diversaj floroj konkurante per beleco, kaj fontofluoj kvazaŭ atlaso. Plue, la homoj diligente kaj

pene laboras, tiel ke vivo fariĝas pli kaj pli feliĉa. Ĉie montriĝas ĝojplenaj dancoj kaj kantoj. . . .

Ju pli li rigardadis, des pli li koleriĝis. Li furioziĝis: "Mi pensis, ke mia Ĉiela Palaco estas la plej feliĉa kaj bela. Neniel imagis mi, ke la banala homaro kuraĝus superi mian palacon en feliĉo kaj perfekteco."

Senprokraste, Dio Yuhuang dekretis al iu generalo, ke li tuj iru al la homa mondo por ĝin elbruligi.

La generalo obeeme foriris de la Ĉiela Palaco kaj iris rekte al la homa mondo.

Atinginte la homan mondon, la generalo ekvidis, ke la vivo tie estas tute mala al tiu de la ĉielo. La feliĉa vivo de homoj estas akirita, ne per sango kaj ŝvito de la aliaj sed per strebado de la homoj mem. Li klare sciis, ke malobeo al la ordono de Dio Yuhuang signifas morton. Li pripensis kaj pripensadis. Finfine li faris decidon: li preferus pereon ol plenumon de la ordono detrui la homan mondon. Tiel, li revenis al la Ĉiela Palaco kaj raportis al Dio Yuhuang ke la homa mondo jam estas tute forbruligita laŭ lia ordono.

Dio Yuhuang triumfe ridis. "Kiu estas la plej feliĉa? Neniu pli ol mi, la estro de ĉiela regno. Kie troviĝas perfekteco? Nur ĉi tie en la alta ĉielo mia."

Iun tagon, ankoraŭfoje sentis sin ĉagrenita Dio Yuhuang pro tro longa sidado kaj kuŝado. Li subite ekmemoris pri la elbruligita tero. Li deziris vidi la ruinion por distrigo. La servantoj helpis

lin al la ĉiela pordego, kiun ili tuj malfermis. La ĉiela dio ĵetis rigardon al la tero: vidiĝis la tero pli bela ol antaŭe, la vivo de homoj pli feliĉa ol antaŭe. Li preskaŭ freneziĝis pro kolerego. "Spitemulo!" li kriis, "Ĉu vi manĝus koron de urso kaj trinkus galon de leopardo ke vi kuraĝis kontraŭstari mian ordonon." Urĝe li dekretis, ke la generalo estu tuj kaptita kaj senkapigita.

Mortigita estis la generalo, sed lia koro pri savo de la mondo ne mortis. Lia sango falis en gutoj, unu el kiuj atingis la teron, kie iu monaĥo konservis ĝin en ruĝa silkaĵo.

Pasis unu tago, du tagoj. En la vespero de la tria tago, la guto da sango aliformiĝis en bubeton, kiu ploregante informis la homojn: "La tirana Dio Yuhuang ĵaluzas pri la feliĉo kaj ĝojo de la homa mondo, li ordonis min detruigi la mondon per fajro. Ne plenuminte lian volon pro kompatemo, mi estis mortigita. Sed la ĵaluza koro de la ĉiela dio ankoraŭ ne mortas. En tiu ĉi vespero li sendos alian generalon bruligi la homan mondon, kaj decidis vidi la okazaĵon per siaj propraj okuloj. Rapidu sciigi ĉiujn, ke ili ekbruligu torĉojn antaŭ siaj domoj sinsekve por tri

noktoj, tiel oni povos konfuzi la vidon de Dio Yuhuang kaj eviti la katastrofon."

Lia diro rapide disvastiĝis de unu homo al dek homoj, kaj de dek homoj al cent homoj, kaj finfine la tuta homaro estis sciigita. Antaŭ la pordo de ĉiu domo bruliĝis torĉo el pinobranĉoj. Flagrantaj flamoj brilis ĉe la torĉo-pintoj sinsekve por tri noktoj.

La tirana Dio Yuhuang propraokule vidinte la fajron en la homa mondo, kontente ridis.

Tio estas la legendo pri la origino de la Torĉo-festo. Evidente, la fina venko apartenas ne al la arbitra, kruela ĉiela dio, sed al la vasta popolamaso. Por memori la sennoman heroon, kiu sin oferis por savi la mondon kaj por celebri sian venkon, la homoj ĉiujare sammaniere bruligas torĉojn ĉe siajn pordojn en la vesperoj de la 25-a, 26-a kaj 27-a tagoj de la sesa monato laŭ la luna kalendaro. Jen estas la Torĉo-festo de Naŝ-nacio, ĉiujare observata per la plej respektoplena ceremonio. Nun la festotago ankaŭ fariĝas dato por gejunuloj amindumantaj, por dancoj kaj kantoj ĝojigantaj.

Trad. Censinio

. KURANTAJ * AFEROJ . KURANTAJ * AFEROJ . KURANTAJ * AFEROJ . KURANTAJ * AFEROJ . KURANTAJ * AFE

Kreskas Tritika Produkto en Henan-Provinco

Jaro	Pomua Produkto
1949	42.25 (kg.)
1950	40.25
1951	51.1
1952	43.25
1953	40.35
1954	54.7
1955	57.5
1956	58.5
1957	56.5
1958	127

NOVA REKORDO DE LA SOMERA RIKOLTO DE TRITIKO

Tritiko estas rigardata kiel malaltproduktiva greno ĉe ni. Ordinare por ĉiu muo (=6.667 aroj) oni rikoltis ne pli ol 100 kilogramojn, en unika okazo 250 kilogramojn.

Post la kooperativigo de la agrikulturo, la fortoj kaj rimedoj de la kamparanoj estas organizitaj kaj koncentritaj. Tio ebligas al ili fari kion ili ne povis individue en la pasinteco. Lastan vintron oni faris en la kamparoj diversspecajn irigaciajn konstruojn, grandskale kolektis sterkaĵojn ĉiuspecajn, disvastigis bonspecajn semojn kaj novajn teknikojn agrikulturajn. Kun ĉiu paŝo la kamparanoj iom post iom ekkonsciiĝas pri sia propra forto kaj kreis multajn novajn instrumentojn, kiuj ofte multoble altigas la laborefikon.

Nun oni rikoltas la tritikon. La rezulto montris ke oni klopodis ne vane. La rikoltoj en multaj lokoj altiĝis tre konsiderinde. La meza po-mua produkto de Henan-provinco ekzemple plialtiĝis je pli ol 100%, kompare kun tiu de la lasta jaro (127:56.5 kilogramoj). Tiu de Meng-gubernio de tiu provinco (kun 258,000 muoj da tritikkampoj) atingis eĉ 269 kilogramojn.

Rilate al la rikoltkvanto de unuopaj terpecoj la tagjurnaloj ĉiutage raportas pri novaj rekordoj komenciĝante per 500 kilogramoj kaj poste 1,000, 1,500, 1,800, 2,200 kilogramoj. La nuna (eble provizora?) rekordo estas 2,733.5 po muo aŭ 410 kilogramoj po aro, kiun atingis iu agrikultura kooperativo, Miaotan-xiang Gucheng-gubernio, Hubei-provinco, en sia 1.5 muoj da agro.

Kunlaboro kontraŭ Erozio

K-do D. L. Armand estas Sovetia esperantisto ekde 1922. Antaŭ 2 jaroj li venis Ĉinion kiel specialisto por helpi la batalon kontraŭ erozio en la baseno de la Flava Rivero. Estas honore por ni konigi pri tiu ĉi kunlaboro al niaj legantoj.

—La Red.

PROCEDO de erozio konsistas en forlavo de fekunda supra grundo de pluva kaj degela akvo kaj en formado de ravenoj. Parenca al ĝi procedo de forblovo konsistas en forporto de suprogrunderoj per vento. Ambaŭ malutilaj procedoj evoluas dank' al uzo de nekonformaj al naturkondiĉoj, malĝustaj metodoj de terkulturo.


Nun, rezulte de ĉiuloka ekstermado de arbaroj kaj plugado de stepoj, la ĵus menciitaj procedoj disvastiĝis tutmonde kaj kaŭzas nekalkuleblan malprofiton al popola ekonomio de multaj landoj. Ekzemple en Usono per ili jam estas findetruitaj aŭ forte difektitaj 113,000,000 hektaroj da valoraj terenoj, inkluzive 20,000,000 hektarojn da kampoj, 310,000,000 hektarojn da terenoj estas malpli forte detruitaj.

Ĉinio estas unu el la landoj, plej multe suferintaj de erozio. Laŭ la materialoj donitaj de la Scienca Akademio de Ĉinio diversaj formoj de erozio detruis ĉirkaŭ 150,000,000 hektarojn da agro. Plej forta erozio evoluas en la baseno de meza fluo de la Flava Rivero (t.e. la provincoj Shanxi, Shānxi kaj Gansu). Tie en ĉiu kvadrata kilometro ekzistas mezkvante 3-4, eĉ ĝis 8 kilometroj da eroziaj

ravenoj. En tiaj lokoj konserviĝis nur 15-30% de areo de ebenaĵo, sed eĉ sur tiuj kompatindaj pecacoj la supra grundo jam plene forlaviĝis. Prilabori la kampojn tie estas tre malfacile, ĉar ili estas dispecigitaj je etaj partoj kaj dividitaj per profundaj abismoj. Rikoltoj en tiuj regionoj estas tre malgrandaj, plejparte ĉirkaŭ 50 ĝinoj da greno po muo.

? — 2 kg / 1 mu = 30 kg / 1 ha

La kaŭzo de neordinare intensa evoluo de erozio en meza fluo de la Flava Rivero kaŝiĝas en koincido de kelkaj malfavoraj naturaj kaj historiaj kondiĉoj. Ekzistas kvar tiaj kondiĉoj: 1) La supraj tavoloj de tero estas formitaj el loeso — tre *malkompakta* sedimenta mineralaro tute ne kapbla kontraŭstari al atakoj de akvo kaj vento; 2) La reliefo konsistas el malaltaj montoj kaj *dissegitaj* altebenoj, pro kio la pluva akvo rapidege fluas de la supraĵo kaj havas grandan forlavan forton; 3) La plejparto de atmosfera akvo koncentriĝas dum du monatoj de la jaro, nome julio kaj aŭgusto, kaj falas en formo de tre fortaj pluvegoj; 4) La loĝantaro de la supre nomitaj tri provincoj estas tre densa; por sin nutri ĝi estis devigita ekstermi arbarojn kaj plugi deklivojn, eĉ tiom krutajn, ke en aliaj landoj oni taksus ilin neplugeblaj (ĝis 35° kaj pli). Por mastrumi agrikulturon ĉe tiom malprofitaj kondiĉoj oni devas ellabori kaj apliki tute nekutiman specialan sistemon de terkulturo kaj bredado, la tiel nomatan sistemon de *akvo- kaj grundo-konservado*.



La ĉina popolo jam delonge luktas kontraŭ erozio. Ĉinaj kamparanoj ellaboris multnombrajn metodojn por konservi la fekundecon de supra grundo. Tamen, antaŭ la liberiĝo ili ne povis ĉesigi la detruantajn naturajn procedojn, ĉar al ili mankis la necesaj sciencaj scioj kaj precipe ĉar ili vivis en mizero kaj havis nek bonajn terkulturajn ilojn, nek bonrasan brutaron. Gravan embarason en kontraŭerozia lukto prezentis ankaŭ la privata terposedo kaj divido de bienoj inter milionoj da etaj bienuloj kaj farmuloj.



K-do D. L. Armand (la dekstra) manpremas kun k-do Hujucz, prezidanto de Ĉ.E.L.

Kiam la popola registaro fondiĝis, ĝi tuj komprenis la unuavican gravecon kaj urĝecon de kontraŭerozia lukto kaj establis serion da institucioj por direkti ĉi aferon. Dum kelkaj jaroj kontraŭerozian laboron gvidis Komitato de Akvo-mastrumado de la Flava Rivero. Krome ĉe provincaj registaroj estis kreitaj administretoj aŭ fakoj por konservado de akvo kaj grundo, kies ĉefcelo konsistis en propagando inter la popolanoj pri progresaj metodoj de lukto kontraŭ erozio kaj forblovo. Ĉe la Komitato de Akvo-mastrumado de la Flava Rivero kaj la ĵus menciitaj administretoj kaj fakoj estis organizitaj eksperimentaj stacioj por provo kaj kontrolo de terkultura, arbarkultura kaj akvoteknikaj manieroj por haltigi malutilajn naturajn procedojn. Nuntempe Ĉinio jam posedas la plej densan en la mondo reton de tiaj stacioj. Finfine, en jaro 1957 ĉe la Centra Registaro estis establita Komitato por Konservado de Akvo kaj Grundo, destinita por unuigi la klopodojn en ĉi direkto de la ministerioj de akva, terkultura kaj arbar-kultura mastrumado, de la Komitato de Akvo-mastrumado de la Flava Rivero de la Scienca Akademio de Ĉinio ktp. Lukto kontraŭ erozio estis enskribita kiel unu el gravaj punktoj en projekton de 12-jara plano de disvolvado de agrikulturo en Ĉinio.

La Scienca Akademio de Ĉinio ludas eksterordinare gravan rolon en lukto kontraŭ erozio kaj forblovo. En jaro 1955 la Kompleksa Ekspedicio organizita de ĝi faris tre multe por ellabori sciencan metodaron de akvo- kaj grundo-konservado konforman al la nuna nivelo de scio.

Ekde 1957 en laboroj de la Ekspedicio komencis partopreni Sovetiaj specialistoj. En esploroj

de la Unuigita Ĉinia - Sovetia Taĉmento kunlaboris jenaj Sovetiaj fakuloj: naturgeografiisto, topografiisto, suprogrundisto, hidrologiisto, botanikisto kaj arbaristo. Inter la 130 ĉinaj partoprenintoj en la taĉmento estis, krom eminentaj profesoroj — specialistoj en la supre menciitaj fakoj — ankaŭ terkulturistoj, bredistoj kaj ekonomiistoj. Laboron de la taĉmento senpere gvidis la estro de la Kompleksa Ekspedicio kaj direktoro de la Suprogrunda Instituto de la Scienca Akademio de Ĉinio en Nankino, profesoro Ma Rong-zhi.

*haveri de ĉiuj fakoj
kaj eksterordinare!
procezoj de ĉiuj fakoj.*


Dum 1947 la taĉmento plenumis ekspediciajn esplorojn laŭ jena marŝvojo: Pekino — Datong — Taiyuan — Sanmenxia — Xi'an — Xifeng — Pingliang — Tianshui — la montaro Qinling — Dingxi — Lanzhou — Yichuan — dezerto Alaŝan — deserto Ordos — Yulin — Suide — Liŝan. Krom tio estis traveturitaj pluraj suplementaj fakaj marŝvojoj. Ĉe la eksperimentaj stacioj de Suide kaj Liŝan, la taĉmento laboris dum kelkaj semajnoj. La celo de ĉi laboroj konsistis en detala observo de eroziaj procedoj, en helpo al stacianoj je ellaborado de esplorplanoj kaj en preparado de modelaj projektoj de terorganizo de agrokoooperativoj. Geografiistoj partoprenintaj en la laboroj de la taĉmento aparte zorgis pri eltrovo de diversaj kontraŭeroziaj proponoj por diversaj regionoj konforme al iliaj naturaj kaj ekonomiaj kondiĉoj de ĉiu regiono.

Dum esplorado ekklariĝis, ke kunlaboro alportas senduban utilon al la ĉinaj same kiel al la Sovetiaj partoprenantoj de la taĉmento. La Sovetiaj sciencistoj, posedantaj pli longdaŭran sperton de ekspediciaj esploroj en fako de geografiaj kaj naturaj sciencoj, instruis ĉinajn kamaradojn pri ekzaktaj metodoj ellaboritaj en Sovetunio. Samtempe ili mem koniĝis kun organizo de praktika akvo- kaj grundo-konservado kaj kun elprovolaboroj de ĉinaj kontraŭeroziaj stacioj. En tiuj ĉi aferoj Ĉinio multe postlasis Sovetunion kaj ni havis sufiĉe da materialo por lerni, uzante la sperton de ĉinaj kamaradoj.

sciistoj

Kontraŭerozia laboro progresas en Qin'an-gubernio, Gansu-provinco

Foto de Hao Chang-jing



Rakonto pri Terpomoj

Ĉi-suba epizodo okazis antaŭ du jaroj.

Estis posttagmezo sufoke varma. El la 4202-a Hospitalo mi reiris al mia roto kaj enue atendadis vagonaron sola en la fervoja stacio ĉe Men'ŭani. Pluvadis ekstere kaj estis ankoraŭ sufiĉa tempo antaŭ la difinita horo de ekveturo, mi tial sidigis en la atendejo kaj endormiĝis baldaŭ. Ne sciante kiom longe mi dormis, subite mi estis vekita de interparoloj. Malferminte la okulojn mi ekvidis, ke tie babladis nia subproviantisto kun iu Korea maljunulino. Versajne, ili ambaŭ tre intime konas unu la alian kaj tial interparoladis ege arde. Mi demandis la subproviantiston, kiam li konatiĝis kun tiu maljuna koreanino.

"Ĉu vi ŝin ne konis?" li demandis. "Ŝi loĝas ĝuste apud nia hospitalo!"

"Tial ŝi kapablas paroli ankaŭ ĉine," rediris mi.

"La maljunulino ja estas bonega," esprimis sin la subproviantisto. "En la pasinta monato mankis al ni legomoj, kaj ni aĉetis de la Koreaj vilaĝanoj du korbegojn da terpomoj, kaj ilin metis apud la rivereto en la intermonto kaj ĉiutage deprenis tiom, kiom ni bezonas.

"Du-tri tagojn poste, la kuiristo Zhaoĉjo spiregante de kurado revenis kaj konfuzite kriis: "Mirindaĵo! Mirindaĵo!"

"Kio okazis?" demandis mi.

"La terpomojn ni jam deprenis por manĝi plurajn fojojn, sed, kiam mi iris preni antaŭ ne longe, tamen restas ankoraŭ plenaj la du korbegoj kiel antaŭe."

"Kiel tio povus esti? En tiu sama momento miaj kolegoj nekredeme iris sekvante lin al la intermonto kaj ekkontrolis. Estas tute vere, ke la du korbegoj da terpomoj estas ankoraŭ plenaj. Ni ĉiuj provis diveni la kaŭzon longan tempon, sed neniel povis kompreni kion tio signifas.

"Ni senŝeligu la terpomojn ĉiujn, kaj tiam kredeble ili plu ne kreskos," iu naive sugestis. Ĉiuj ridegis, sed neniu el la ceteraj povus elpensi rimedon pli bonan, kaj ni devigate ĝin provis.

"Ĉu tio ne estas erpi la maron?" mi demandis.

"Sed vi ĝin divenas maltrafe," respondis la subproviantisto. "Post tio la terpomoj ne plu kreskis tri- kvar tagojn."

"Estas ja interese!" rediris mi.

"Posttagmeze de la sekvinta tago," la subproviantisto daŭrigis, "tuj post kiam la kuiristo

ordigis la kaldronojn, vazojn kaj manĝilarojn kaj pretigis sin iri por ripozi denove la kuiristo Zhaoĉjo ŝanceliĝante alkuris kaj kriis: "La terpomoj ree kreskis! La terpomoj ree kreskis!"

"Tiu-okaze ni ĉiuj surpriziĝis. Tuj sekvante la kuiriston Zhaoĉjo ni rapidis tien por vidi. Ni apenaŭ kredis la okulojn! Jen la terpomoj, jam pliparte formanĝitaj, ankoraŭ plenplenigis la korbegojn, kiel antaŭe tute senŝeligitaj. Ni reciproke direktis la rigardojn unu al la alia, povante nenion elparoli."

"Kion fari do?" mi demandis, "Ĉi tio estas vere stranga!"

"Kion oni povas fari?" diris la subproviantisto, "Oni postenigos tie soldaton por gardi la terpomojn." La soldato, kaŝante sin en arbaro, gardadis du tagojn, tamen trovis nenion eksterordinaran. La terpomoj en la korbegoj estis baldaŭ formanĝotaj, kaj ni ĉiuj falis en nebulon.

"Tagmeze de la kvara tago, ĉiuj siestis, kaj ĉirkaŭe regis paca silento. En la arbaro, krom kelkaj hazarde preterflugantaj birdoj, nenio estis

— ĝis tie ĉi —

An Wei:

Kial „unu“? → **UNU**

PAĈJO sendis al mi de la fora hejmloko en Hunan-provinco paron da ledŝuoj kiel donacon pro mia sukceso eniri universitaton. Svarmiĝis al mi ĉiuj miaj kunlernantoj kaj strebis por ilin rigardi. Mi do ilin metis sur la liton por "ekspozicii". Ili estas faritaj de paĉjo propramane, graciaj kaj elegantaj, tre bone sidas sur miaj piedoj. Ĉiuj kunlernantoj ilin laŭdadis senĉese kaj tio min pli ĝojigis. Tenante la ŝuojn mi sidigis sur la litrandon. Subite mi kaptiĝis de ia melankolio rigardante la belajn papiliformajn nodornamojn sur la ŝuoj kaj droniĝis longtempe en rememoron.

En la somero de 1948, estante 14-jara knabino mi diplomigis el la elementa lernejo kaj min okupis per preparado por enirekzameno de gimnazio. Tiam la vivtenadon de nia kvinmembra familio perlaboris sole mia paĉjo, kiel laboristo en iu

videbla kaj neniu atentus pri tio, ke en la arbaro estas ankoraŭ unu gardostaranto, kiu fikse direktas siajn okulojn al la rivereto por observi, kio povus okazi. En tiu momento, ŝteliris du figuroj el iu dometo de la koreanoj rekte al la valo. La gardisto trovis, ke ili estas la maljunulino kaj ŝia bofilino, ambaŭ kun argila potego sur la kapo. "Probable ili iras por akvo," pensis la soldato en si mem. Sed, kiam ili ambaŭ atingis la intermonton, la du virinoj rigardadis jen dekstren, jen maldekstren, kaj ne ĉerpis akvon. . . ."

"Mi komprenas!" mi intermetis. Kaj eksonis serena ridego ĉe la subproviantisto, kaj la maljunulino.

Jam tiam ĉesis la pluvado, disfandiĝis la nuboj. Sub radioj de la suno brilis surtere akvoj tie kaj ĉi tie. La ĉirkaŭaj montoj aspektas pli freŝverdaj kaj plaĉaj. La fervoja signalo malleviĝis kaj iu laboranto de la stacio kun ruĝa signo-tuko ĉirkaŭbraka, tenante ruĝan flageton en la mano transpaŝegis la relojn al la trotuaro. Evidentiĝis, ke baldaŭ alveturos la speciala vagonaro de la Ĉina Popola Volontularo.

Ni stariĝis, ordigis la vestaĵojn kaj surdorsiginte la valizon adiaŭis salute al la simpatia maljunulino Korea.

Esperantigis Taŭ Taŭjan



Akvoĉerpado Lignogravuraĵo de Song Yan-sheng



ŜUO

ŝufabrika. Panjo malsanis kaj kuŝadis sur la lito. Preskaŭ ĉiutage mi devis viziti apotekon por aĉeti drogojn laŭ recepto, kiun paĉjo akiris, neniu scias de kie. Aŭdinte la bruon de medikamentoprepara vazo, mia patrino ofte grumblis ĝemante: "Preni medikamenton, al kio utilas la medikamento! Ne plu malŝparu monon!"

Estis ĉiam malhele sur la vizaĝo de paĉjo. Malofte oni aŭdis de li kelkajn vortojn dum la tuta tago. Kiam li revenis de la fabrika, li ĉiam glutis vinon tason post taso.

Ekde sia junaĝo paĉjo laboris kiel ŝuisto. Li fariĝis pli kaj pli sperta en ŝufarado, dume pli kaj pli kurbiĝis lia dorso. Neniu scias, kiom da ŝuoj li faris per siaj manoj kaj ĉiuj en la urbo sciis, ke ĝibulo Li ĉe la suda urbopordego lertas en ŝufarado. Verŝajne manko de ŝuoj ne devus okazi al

niaj familianoj! tamen en ĉiu somero mi kaj miaj fratoj devis iri nudpiede sur la strato.

Tiutage mi aŭdis en la ĉambro la paŝojn de paĉjo sur la ŝtupetaro. Mi ankoraŭ ne sukcesis kaŝi mian leglibron li jam eniris. Laŭkutime li jetis al mi malafablan rigardon el rondigitaj okuloj kaj diris: "Ĉu vi ankoraŭ revas fariĝi instruistulino? Tian feliĉon ni ja ne havas!"

Timigite, la du fratetoj sin kaŝis malantaŭ la liton.

Panjo stariĝis ŝanceliĝante. Kiam forpasis la uragano de paĉjo, ŝi varmigiĝis por li tason da rizvino kaj alportis kuiritan rizon kun teoinfuzajo, metis ĝin sur la tablon antaŭ paĉjo, stulte lin rigardis ĝis li finmanĝis, kaj poste ŝi forportis la vazojn kun suspiro.

Tiam neniu el la familianoj parolis. Estis terure, hirtige mallume en la ĉambro. Vagis odoro de tanita ledro el la vesto de paĉjo. Aŭdiĝis nur la susurado de musoj, kiuj ion rodas malantaŭ la lito. Panjo lumigis la olelampon, ĝiaj flavaj radioj prilumis la akvovualitajn okulojn de paĉjo. Estis terure. Ni ne kuraĝis eĉ libere spiri. Neniam



Maturiĝis la Ĉerizoj

forgeseblaj estas la manoj de paĉjo, kiuj ĉiufoje post drinkado ĉiam palpatis la randon de la tablo, kaj pro tio la konsumita tablorando fariĝis brile glata.

“Estus bone lasi ŝin daŭrigi la lernadon!” diris panjo maltrankvile al paĉjo.

Paĉjo nur pli peze palpatis la tablorandon. Post longa tempo li ekfrapis la tablon kaj kolere diris kun rondigitaj okuloj: “Al la diabloj, la lernado! . . . ĉu vi perlaborus monon por ŝia lernado!”

Duonnokton mi kaŝe ploris en tiu nokto pro ĉagreno.

La sekvantan matenon panjo min konsolis vidante miajn ruĝajn palpebrojn: “Minjo ne ĉagreniĝu. Unue vi provu en la enirekzameno de la gimnazioj kaj ne zorgu kion diris via patro.”

Ekde tiu tago panjo ĉiam kaŝis la recepton trovitan ie de paĉjo por ŝia malsano, kaj mi neniel povis ĝin trovi.

Fine mi partoprenis enirekzamenon de iu gimnazio ne informante paĉjon. Kiam venis la tago por la publikigo de la ekzamena rezultato, mi vekigis jam je la krepuskiĝo kaj neniel povis plu dormi sinturnante sur la lito. Mi pensis, se mi sukcesus en la enirekzameno mi nepre ne vanigos la subtenon de panjo bone lernante kaj samtempe bone ŝin helpante en dommastrumaj laboroj, kaj kiam mi plenkreskiĝos, mi mem vivtenos panjon. . . .

Mi aŭdis, ke paĉjo ellitiĝis. Li iris apud mian liton kaj min rigardis tra la moskitovualo. Mi ŝajnis min profunde dormanta. Li iris denove al la lito de panjo kaj flustris:

“Ĉu Minjo sukcesis en la enirekzameno?”

“Hodiaŭ oni publikigos la rezultaton.”

Paĉjo profunde ĝemis kaj malferminte la pordon malsupreniris kun manĝajujo.

Mi tuj saltis el la lito kaj min vestis per studenta jupo refarita el malnova vesto de mia patrino. Kiam mi estis tuj forironta, panjo min vokis de malantaŭe:

“Minjo. . . .”

Panjo ĵetis rigardon al miaj eluzitaj ŝuoj sin levinte de la lito kaj iris malantaŭ ĝin. Mi ŝin sekvis. Ŝi ekstaris ĉe iu kvadrata kesto ruĝe lakita sur kiu tie kaj alie jam montriĝis flavaĵoj de olekalko pro perdiĝo de lako. Sur la 4 anguloj estis latunaj ŝirmiloj kun verda rusto. Sur la kesto pendiĝis ankaŭ granda kaj kurioza seruro el latuno kun kiu ĝi aspektis des pli ekstermoda kaj peza. Panjo prenis grandan ŝlosilon kaj ĝin ŝovis en la serurtruan. Post ekpuŝo, la seruro eligis strangan knaron kvazaŭ dentgrincon faris iu dormanto. La seruro malfermiĝis, ĝia risorto kun granda bruo falis sur la plankon, kaj la kovrilo de la kesto estis knarante malfermita. Panjo sin klinis super la kesto kaj palpatis. Post longa tempo ŝi elprenis paron da ledŝuoj. Mi ankoraŭ klare memoras, ke falis el ili kelkaj kamfor-globetoj, kiuj disruliĝis sur la planko.

“Nu, ŝanĝu viajn ŝuojn per ĉi tiuj!”

Mi rigardis la ŝuojn. Ili estis duon-novaj kaj forte odoris je kamforo. Agrable brilis la cirita led. Ankaŭ sur iliaj dorsoj bele ornamis papili-formaj nodoj, kies flugiloj aranĝiĝis iom supren kvazaŭ ili estus ekflugontaj. Mi mire ilin rigardis ne povante kredi ke tiaj belaj ŝuoj povus esti elprenitaj el la malnova kesto.

“Tiujn ĉi ledŝuojn mi portis je mia edziniĝo al via patro. Li elspezis duonon de sia vivo en ŝufarado, sed tiu ĉi paro estis la sola, kiun li faris

por sia familiano. Mi ne estis sufiĉe malavara por ilin surporti, sed nun ili jam ne plu taŭgas por mi."

Mi rimarkis, ke la voĉo de mia patrino iom tremis. Kvankam ŝi daŭre sin klinis ŝajnigante kolekti la kamforbuletojn, mi tamen bone rimarkis larmgutojn ĉe ŝiaj okulanguloj.

"Provu, ĉu ili bone sidas al vi!"

Mi akceptis la ŝuojn kaj senmove ilin rigardadis.

"Provu!"

Mi ilin surmetis. Estis iom tro grandaj. Panjo almetis du pecojn da ĉifonoj en la antaŭajn partojn de la ŝuoj. Poste, ŝi min akompanis al pli hela loko kaj zorge min pririgardis kaj diris kapjesante: "Iru do, kaj bone ilin zorgu."

"Ĝis revido, panjo."

Tuj post kiam mi eliris el la domo, mi renkontis la najbaran Bofranjon Li.

"Ho, kiom bela estas Minjo, hodiaŭ."

Ankaŭ mi eksentis grandan ĝojon kaj marŝis sur la straton.

La ĉifonoj metitaj en la ŝuoj estis iom tro multaj, kaj kaŭzis al mi doloron. Malgraŭ tio mi intence ĉirkaŭiris kelkajn lokojn por inviti kunlernintojn kune rigardi la nomaron de sukcesintaj ekzamenitoj.

En la parko, ambaŭflanke de aleo staris poploj, kiuj celis siajn pikajn pintojn rekte al la ĉielo. Maso da blanka nubo subite fariĝis homvizaĝo ridanta al mi. Paseroj pepadis saltante. Alaŭdo senĉese palpebrumis al mi. Mi sentis malpezecon, kvazaŭ ĉiuj preterpasantoj pririgardus miajn ŝuojn.

La nomaro surgluiĝis ĉe la pordego de la lernejo. Sur blanka papero estis skribitaj la nomoj de la sukcesintaj ekzamenitoj, kaj sur ĉiu nomo troviĝis ruĝa cirklo. Mi rapide tralegis la liston de la komenco ĝis la fino sed nenie trovis mian nomon. Mi ekmaltrankviliĝis, mia koro forte batis kvazaŭ tamburado. Ree mi ĝin tralegis dekomence — kaj jen la unua nomo estas la mia! je la unua loko klare skribiĝas la nomo Li Ming-yu! Mi frotis miajn okulojn, kaj ne kuraĝis tion kredi. La lipon mi mordis, sed mi ankoraŭ dubis! Se la kunlernintoj ne min turnadus ĉirkaŭbrakante, mi ankoraŭ opinius, ke tiu Li Ming-yu eble estas iu alia samnomulo.

Kun granda ĝojo mi petis de la lernejo sciigan slipon pri pagendaj lernejoj kostoj. Elirinte mi denove staris sub la nomaron kaj ĝin rigardadis longtempe ne volante foriri.

Subite nigraj nuboj albloviĝis kaj kovris la ĉielon. Ekpluvis grandgute. Nur tiam mi rekonsciĝis, ke mi devas tuj liveri la informon al panjo. Levante la piedojn mi tuj memoris la ledŝuojn. Se ili estus malsekigitaj, panjo certe min riproĉus pro mia malzorgo.

Mi demetis la ŝuojn, ilin metis subbraken kaj kuris hejmen en la pluvo. La pluvgutoj tintigadis la ladan tegmentrandon kaj susuris inter la arbofolioj. Ĉio ĉi tio sonis kvazaŭ kantoj en mia koro. La kapon turninte mi ankoraŭfoje rigardis la lernejon vualitan de la pluvo. Kiom grandaj estas la konstruaĵo kaj la korto! Nur kelkajn tagojn poste mi jam fariĝos gimnaziano! kaj lernos en la granda domo!

Kiam mi pasis la parkon, plidensiĝis la pluvo. Momenton mi haltis en la homamaso sub iu monumenta pordego ĉe la parko. Sed tiel malpacienca mi estis, ke mi denove kuris en la pluvon. Mi kuris kaj kuris kaj fine atingis la hejmon.

Mi estis tute tramalsekigita. La jupo gluiĝis sur la femuroj. Pluvakvo fluis laŭ la haroj. Per kelkaj saltoj mi suriris la ŝtupetaron. Panjo elŝovis sian kapon tra la pordo. Mi ŝin alparolis kun amemo:

"Mi sukcesis, panjo!"

"Ĉu vere?"

Ŝi min pririgardis kaj subite diris:

"Kaj la ŝuoj?"

"Jen!"

Kolektado de Morusfolioj



Sed kiam mi eltiris sub la brako, restis nur unu ŝuo!

Subita ekstremo min frapis. Malvarmo enpenetriĝis en mian koron. Mi ĉirkaŭrigardis, la alia jam perdiĝis.

Mi stulte staris tie senmove. La fizionomio de panjo subite fariĝis malluma, blua. Tremetis la sulkoj ĉe ŝiaj buŝanguloj. Ŝi fikse min rigardis.

Ĝi certe perdiĝis en la parko, kiam mi haltis tie por min ŝirmi kontraŭ la pluvo! Mi formetis la restan ŝuon, returniĝis kaj forrapidis malsupren de la ŝtupetaro kaj min ĵetis nudpiede sur la straton en la pluvego.

Mi kuris kaj kuris. La pezaj pluvgutoj dolorige frapadis mian verton. La pluvakvo kovris miajn okulojn. Muĝis la vento ĉe miaj oreloj. Ĉio de la ĉirkaŭaĵoj fariĝis malklara. Mi perceptis nur nigrajn ombrojn, kiuj glitis unu post alia malantaŭen preter miaj okuloj. . . .

Kiam mi atingis la parkon, sub la monumenta pordego restis jam neniu. Surtere kuŝis la piedpremita glitiga koto. Mi ree kaj ree traserĉis en la koto, sed vane. Nenie mi povis trovi la ŝuon. Ekfebris mia vizaĝo pro maltrankvilo. Mi staris stulte en la pluvo lasante la pluvon kaj miajn larmojn kunflui en la buŝon. Senprudente mi rigardadis ŝuojn kaŭĉukajn, sportajn kaj ledajn. . . . Subite mi rimarkis paron da ledŝuoj kun papiliformaj nodoj paŝantan antaŭen. Mi ĝin sekvis kaj sekvis. . . .

Mi ne sciis kiom longe mi iris. Kiam mi levis mian kapon, mi ekrimarkis, ke mi denove venis al la pordo de la lernejo. La nomaro ankoraŭ tie gluiĝis. Mi sentis min kvazaŭ paralizita. Nenion mi kuraĝis rigardi kaj nenion mi kuraĝis ekpensi.

Mi iris kaj iris, vagis sencele. Mi ĥe kuraĝis reiri hejmon, ne pro tio, ke panjo min riproĉus, aŭ tio, ke paĉjo min batus. Verdire mi ne sciis kion mi timis. Ŝajnis al mi, ke perdiĝis kune kun tiu ĉi ŝuo la belaj revoj de mia junaĝo. Ili tiel forglitis kaj neniam revenos.

Vespere mi hejmen revenis paŝon post paŝo kun malplenaj manoj. Min vidante panjo nenion diris. Nur ŝia mieno pli malsereniĝis. Ŝiaj okuloj pli malvigliĝis. La junaj fratoj fariĝis pli timemaj kaj gape min rigardis.

Mallonge poste la malsano de panjo pli graviĝis. Tial mi eĉ supozis, ke eble ankaŭ la perdo de tiu ŝuo kaŭzis la malboniĝon de ŝia sano. De tiam mi ĉiam sentis ĉagrenon, tion rememorante.

La malsano tiel daŭris. Paĉjo estis plene ŝarĝita de ŝuldoj, kaj ne povis pagi la medikamentojn. Pluvis en la vespero, kiam panjo estis

mortanta. Des pli mallume estis en la ĉambro. Paĉjo drinkis tutan tason da vino per unu sola gluto. Ruĝaj vejnoj plenigis liajn okulojn. Fikse li rigardadis min kaj miajn junajn fratojn surlite sidantajn.

Neniu el ni laŭte ploris. Aŭdiĝis nur la peza kaj monotona tiktakado de pluvgutoj defalintaj de la tegmento.

Fine panjo angore nin forlasis. Eĉ nun mi povas klare memori la tristan momenton antaŭ ŝia morto: la tuta familio nur larmis unu kontraŭ la alia.

Ĉina popolfabelo:

La Flava

AM estis mizera klerulo, nomata Lao Ma. Li estis tiel malriĉa, ke li ne povis pagi eĉ tason da teo. Kredeble li mortus pro malsato jam antaŭlonge, se iu tetrinkeja mastro ne lin kompatus kaj donus al li nutraĵojn.

Iun tagon Lao Ma diris al la mastro de la tetrinkejo:

“Mi tuj foriros. Sed mi ne povas pagi al vi la ŝuldojn pro teo kaj manĝaĵoj, ĉar ĉe mi restas neniu groŝo. Tamen mi ne volas esti maldankemulo. Jen, rigardu!”

Kun tiuj vortoj la klerulo elpoŝigis pecon da flava kreto kaj gruon surpentris sur la muron de la tetrinkejo. La gruo aspektis tute kiel viva, krom tio, ke ĝi estis flava.

“Ĉi tiu gruo,” diris Lao Ma, “alportos al vi amason da mono, eĉ dekoble pli multe ol la sumo, kiom mi ŝuldas al vi. Kiam klientoj kolektiĝos, nur se ili manklakos trifoje, ĝi ekflugos de sur la muro kaj komencos dancadon. Tamen vi nepre memoru, ke neniam devigu ĝin dancadi por unu sola persono. . . Nu, mi foriras. Ĝis revido.”

Tion dirinte, la klerulo deturnis sin kaj foriris.

Mi ankoraŭ memoras, kiel paĉjo larmante stariĝis de la tablo kaj ŝanceliĝante eliris pruntepreni monon por ĉerko.

Pasis jam pli ol ok jaroj. Ĉiujare, kiam mi hejmen reiris en la lerneja libertempo, mi vidis, ke kvankam la dorso de paĉjo pli kurbiĝis, la sulkoj sur lia vizaĝo ankaŭ pli profundiĝis, kaj iam kaj tiam li ankoraŭ prenis tason da vino. Li ne plu palpadis tablorandon per la manoj, sed foje kaj foje malpeze takte frapetadis per la fingroj sur la tablo kaj kantetis *huagu-xi**. Foje li kontente karesis siajn lipharojn kun ridemo, kiun

eĉ la pintoj de la lipharoj partoprenis. Tiam ĝoje brilis liaj okuloj, ke oni trovas lin pli juna ol antaŭe.

Dum tiuj jaroj neniu el ni plu menciis pri la ŝuoj, kvankam ni scias, ke unu el ili estas metita de panjo en la malnovan lignan keston, sed neniu el ni volas ĝin tuŝi.

Trad. Honfan

**Popola kanto kun danco akompanata de simpla muziko, populara en vilaĝoj de la regiono de Yangzi-rivero.*



Zi Graw
Gruo

La mastro estis tre mirigita, sed li decidis tion provi. La sekvantan tagon, kiam en la tetrinkejon alvenis multaj klientoj, li petis ilin manklaki tri fojojn. Vere kiel dirite, la flava gruo tuj flugis de sur la muro kaj dancis kelkajn dancojn ĝojajn kaj interesajn. Post tio, la birdo denove reflugis sur la muron. La gastoj estis treege mirigitaj kaj ĉiuj admiris apenaŭ povante kredi siajn okulojn.

Kaj tiel pasis ĉiutage.

La famo pri ĉi tiu mirinda fenomeno tuj diskonigis en la ĉirkaŭaĵoj. Homoj alfluadis kiel tajdo al la tetrinkejo. Konsekvence la mastro de la tetrinkejo multe gajnis kaj riĉiĝis. La promeso de Lao Ma realiĝis.

Foje, iu riĉega altrangulo venis ankaŭ en la tetrinkejon. Vidante tiom da simpluloj sidantaj tie, li koleriĝis kaj ordonis forpeli ilin ĉiujn.


Liaj lakeoj laŭordone sin ĵetis kontraŭ la amasoj svingante bastonojn. Tiel ĉiuj estis fortimigitaj, kaj restis en la tetrinkejo nur la altrangulo. Li elmetis antaŭ la mastro grandan monsumon kaj ordonis dancigi la birdon por li mem. Vidante la grandan monsumon, la mastro tuj forgesis la konsilon de Lao Ma. Li manklakis tri fojojn; la flava gruo malgaje

iris de sur la muro kaj dancis nur unu dancon. Ĝi aspektis tre malagrabla, kvazaŭ ĝi malsanas. Post tio ĝi reiris sur la muron kaj ne moviĝis plu. La altrangulo kriaĉis, minacis, sed vane.

En la nokto, aŭdiĝis forta frapado ĉe la pordo de la tetrinkejo. La mastro malfermis la pordon kaj ekvidis Lao Ma tie staranta. La klerulo nenion diris. Li ekludis fluton eltiritan el sia poŝo kaj foriris, eĉ ne ĵetis unu plian rigardon al la tetrinkejo. Aŭdinte la fluton, la gruo eksvingis siajn flugilojn, deflugis de sur la muro kaj rapidege forflugis post lin. Ekde tiam neniu plu vidis la klerulon Lao Ma, nek lian sorĉan grupon.

La maljunuloj diras, ke se ie aperus tia flava gruo, ĝi certe ankaŭ servus por ĉiuj. Sed, se iu volos ĝin alproprigi, ĝi certe ree forflugos kiel antaŭe.

Elĉinigris Taŭ Taŭjan



Laboristo-poetoj

EN la orienta antaŭurbo de Pekino sin trovas laborista grupeto de libertempa literatura verkado. Ĉiuj dek kvar libertempaj verkistoj de la grupeto estas junaj laboristoj. Ili preskaŭ ĉiuj ŝatas poemon. Ankaŭ tio, kion ili verkas, estas poemoj. Antaŭ du jaroj, ili ankoraŭ estis nur amantoj de literaturo kaj la verkado nur estis revitajo por ili. Sed oni ne imagis, ke hodiaŭ post du jaroj, dum la liberaj horoj ili jam povas kanti sian laboron, la rapidegan konstruadon kaj brilan, belan vivon de nia popolo per siaj propraj plumoj. Dum pli ol unu jaro, ili jam publikigis unu post la alia pli ol du cent poemojn kaj kelke da prozoj en ĉirkaŭ dek ĵurnaloj kaj gazetoj, nome "Laborista Ĵurnalo", "Ĵurnalo de Pekino", "Popola Literaturo", "Poemoj", "Nova Observado" ktp. Iliaj poemoj estas plenaj de idealo de la junaj laboristoj pri laboro kaj vivo, kiu karakterizas la verkadon de la junaj laboristoj.

Tiu ĉi laborista grupeto de libertempa verkado kreskas sub la rekta gvidado de la Kultura Domo

Ankaŭ ni ekagu! Lignogravuraĵo de Chen De-hong



de la orienta antaŭurbo de Pekino. La pliparto el la grupanoj estas amantoj de literaturo, lertuloj en produktado kaj aktivuloj en socia laboro. Ili aktive partoprenas la propagandajn agadojn en la fabriko. Ili skribas de tempo al tempo mallongajn informojn "kuaj-ban"* kaj poemojn por la fabriko ĵurnalo kaj la nigratabulaj periodaĵoj. Iuj el ili fariĝas redaktoroj de la periodaĵoj sur nigraj tabuloj de la laborejoj aŭ de la tuta fabriko. Ilia agado de verkado ne nur ne malhelpas al la produktado, sed helpas la laboron de propagando kaj agitado, tial ili estas subtenataj kaj prizorgataj de la givdantaro de la fabriko. Partoprenante la propagandan laboron, ili levas la kapablon de verkado kaj klaskoncion kaj riĉigis sian scion.

La agado de tiu ĉi grupeto okazas en dimanĉoj, kaj seninterrompe persistas jam du jarojn. En la komenca periodo, la grupeto atentis pri legado de elektitaj verkoj de famaj verkistoj. Sed post ne longe, oni ŝanĝis tiun ĉi metodon kaj emfazas, ke ĉiuj devas diligenti en verkado. Tiel la agado de la grupeto estas ĉefe diskuti la verkojn de ĝiaj membroj. Dum pli ol unu jaro, ili diskutis tridekfoje la verkojn de la membroj kaj rekomendis aperigon de kelkaj bonaj al ĵurnaloj kaj gazetoj. Kiam ilia nivelo de verkado leviĝas en ekzercado, ebligante aperigon de iliaj verkoj, tiam ilia entuziasmo pri verkado pli multe grandiĝas kaj ili fariĝas pli intimaj al la grupeto de verkado.

Ĉiutage post laborado, la membroj ankaŭ devas partopreni socian laboron, tial ilia libera tempo estas tre malmulta. Sed ili povas utiligi ĉiun momenton por legi kaj skribi atente kaj ili notas guton post guto la sentojn pri la vivo. Ju pli ili skribas, des pli entuziasmaj kaj interesataj ili fariĝas. Ili hardas sin en diligenta legado kaj skribado. Kaj leviĝas ilia nivelo de verkado.

Multaj verkistoj el la Federacio de Literaturaj kaj Artaj Laborantoj de Pekino kaj el la Ligo de Ĉinaj Verkistoj partoprenas la agadon de la grupeto. Redaktoroj de iuj gazetoj ankaŭ de tempo al tempo iris al la grupeto, ili diskutis problemojn pri verkado kun la membroj, kaj instigis ilin pli multe skribi mallongajn precizajn pecetojn spegulantajn la realan vivon. Dum la pasintaj tri

* "Kuai-ban", unu el la literaturaj formoj, karakteriziĝas per deklamo de rimaj versoj akompanate de sonoj de la klakilo.

klaki = klakstari

La Orienta Zhou-dinastio daŭris ekzisti ĝis la jaro 249 a.K., sed la reĝoj estis jam ne sufiĉe potencaj por superregi la feŭdajn princojn. La periodon de la jaro 722 a.K. ĝis la jaro 481 a.K., oni nomas la epoko de "Printempo kaj Aŭtuno", laŭ la titolo de la historia libro verkita de Konfucio, kiu tiun periodon ampleksas.

Disfalado de Vilaĝa Komunumo Dum la nomita epoko, feraj plugiloj, ŝoveliloj kaj hakiloj estis jam uzataj en terkulturado. Depost kiam la kamparanoj ekuzis la ferajn instrumentojn kaj plibonigis la teknikon de terkulturado, la tero de la vilaĝa komunumo ne plu estis redistribuata periode, laŭ ĝia fekundeco. Iom post iom la tero fariĝis privata posedaĵo de la kamparanoj, la aristokratoj ankaŭ ĝin ekuzurpis, kaj ruiniĝis la reĝimo de publika terposedo de vilaĝa komunumo. Dume ankaŭ etendiĝis kaj kunligiĝis la agroj de ĉiuj princlandoj. Kaj inter la landoj ofte okazis militoj por rabakiri teron.

Huaxia kaj Rongdi Troviĝis tiam multe da dislokitaj agrikulturaj regionoj en la basenoj de la Flava Rivero kaj Yangzi-rivero kaj inter tiuj regionoj vastaj herbejoj kaj arbaroj. La herbejoj estis frekventataj de la nomadoj kaj en la arbaroj loĝis la triboj sinvivtenantaj per ĉasado.

La terkulturistoj nomis sin mem Huaxia-anoj kaj tiujn de la nomadoj kaj ĉasaj triboj Rongdi-

kaj mallaŭte, sen klara tonkarakterizo. La malpeza tono estas montrata per foresto de ton-signo, kiel ĉe 'men' en 'wōmen', 'nǐmen', 'tāmen', kaj la vokalo 'i' en silabo 'zi' ellasiĝas por montri la malpezecon de la tono de 'i', kiel ĉe érz anstataŭ érzy.

EKZERCOJ

Legu la sekvantajn frazojn:

1. Lǎoshī ài xuéshēng, xuéshēng ài lǎoshī.
2. Wǒ yǒu gāngbǐ, qiānbǐ, bǐjìben hé shū.
3. Nǐ yǒu gāngbǐ, méiyǒu qiānbǐ.
4. Lǎoshī ài wǒmen.
5. Tā yǒu bàba hé māma.
6. Tāmen dú bàozhǐ.
7. Zhège xuéshēng méiyǒu māma.
8. Nimen dú shū, tā dú bàozhǐ.

La Epoko de Printempo

anoj. Ili kontaktiĝis unu kun la alia kaj ofte faris reciproke invadon aŭ rabadon inter si.

Ekspansio de la Princlandoj Chu, Qi, Jin, Qia En la unuaj jaroj de la sepa jarcento a.K., la kvar regnoj: Chu, Qi, Jin, Qin komencis aneksadon al la ĉirkaŭaj malgrandaj landoj kaj triboj, kaj potenciĝis pli kaj pli.

Chu-lando sin disvolvis en la varma, pluvoza regiono de Yangzi-rivero kaj aneksis unu post la alia multe da landetoj en la basenoj de Yangzi-kaj Hanshui-riveroj. Ĝi malobservis la sistemon de feŭdo-disdono de Zhou-dinastio, uzurpe sin nomis per la titolo de reĝo, ĉesigis la tributliveradon al la reĝo de Zhou kaj senĉese sin etendis norden. Tio fariĝis granda minaco al ĉiuj landoj de la Centra Ĉinio.

Qi en Shandong-duoninsulo estis granda lando de komence. Ĉe ĝia marbordo, produktiĝis abunde da fiŝoj kaj salo. La kampoj de morusarboj de la meza ebena ebligis disvolvi produkton de silko. Tial Qi fariĝis riĉa kaj granda lando en la oriento.

Jin-lando en Fenshui-baseno, kie plene disvolviĝis la agrikulturo, aneksinte la malgrandajn landojn kaj Rongdi-tribojn en la ĉirkaŭaĵo, pli kaj pli potenciĝis.

9. Bàba hé érz dú shū, lǎoshī hé xuéshēng dú bàozhǐ.

10. Nín ài wǒmen.

Esperanta traduko de la supraj frazoj:

1. Instruisto amas lernanto(j)n (kaj) lernanto(j) amas instruiston.
2. Mi havas plumon, krajonon, kajeron kaj libron.
3. Vi havas plumon, (sed) ne havas krajonon.
4. (La) Instruisto amas nin.
5. Li havas patron kaj patrinon.
6. Ili legas ĵurnalon.
7. Tiu ĉi lernanto ne havas patrinon.
8. Vi (pluralo) legas librojn, li (ŝi) legas ĵurnalojn.
9. (la) Patro kaj filo legas librojn, (la) instruisto kaj lernantoj legas ĵurnalojn.
10. Vi amas nin.

po kaj Aŭtuno

Qin-lando en Shānxi-provinco, kiu aneksis ĉirkaŭajn Rongdi-tribojn, fariĝis granda lando en la okcidento.

Kiel rezulto de la apero de grandaj landoj ekestis la interlukto por la superpotenco.

B. Lukto por la Superpotenco de la Grandaj Landoj

Qi Huan-gong Qi Huan-gong, regnestro de Qi-kiel lando, estis la unua superpotenculo de la epoko.

Meze de la sepa jarcento a.K., la milito inter Huaxia-anoj kaj Rongdi-anoj ekfuriozis. La nordaj Rongdi-triboj Di kaj Shanrong atakis la landojn Wei kaj Yan ĉe la norda bordo de la Flava Rivero, kaj preskaŭ ilin renversis.

La princlandoj Huaxia-aj unuiĝinte sub la gvido de Qi Huan-gong rezistis la invadon de Rongdi kaj helpis al la invadataj landoj. La landoj Wei kaj Yan saviĝis de pereigo dank' al lia helpo.

En la jaro 656 a.K., Qi Huan-gong komandante la unuigitajn armeojn de ok landoj, militiris kon-



Konfucio (la dua dedekstre) aŭskultas diskutadon de siaj disĉiploj

Pentris Xu Bei-hong

traŭ Chu-lando kun la riproĉo, ke la atakato ne prezentis la tributon al la reĝo de Zhou. Premate de la forta armeo Chu-lando akceptis la traktaton, kaj ĉesigis portempe la ekspansion al la Centra Ĉinio. La malgrandaj landoj subigitaj antaŭe de Chu-lando, sin ekturnis depende sub la potencon de Qi.

Qi Huan-gong unuigis la princlandojn per jena devizo: "Por lojaleco al la reĝo de Zhou kaj sindefendo kontraŭ la fremdaj triboj." Li naŭ fojojn kunvokis la dependajn landojn al la jurkunveno. Li iniciatis la starigon de deviga konvencio, kiun ĉiuj landoj devis kune observi. Ĝiaj ĉefaj klaŭzoj estis: malpermeso al fluoŝtopado de la riveroj; libera cirkulado de grenoj; lojaleco al la reĝo de Zhou kaj paco inter la landoj.

La Strebado al Superpotenco de Jin, Chu, Wu kaj Yue Ekde la dua duono de la sepa jarcento a.K. ĝis la unua duono de la sesa jarcento a.K. en ĉirkaŭ pli ol okdek jaroj, okazis multfojaj longdaŭraj militoj inter Jin kaj Chu por konkeri la superecon. Kaj la skalo de ĉiu nova milito fariĝis ĉiam pli granda ol la antaŭa.

Komence de la fino de la sesa jarcento a.K., la landoj Wu kaj Yue ĉe la malsupra parto de Yangzi-rivero ankaŭ ekleviĝis unu post la alia en batalado por supereco. Wu venkis Chu kaj Qi en milito kaj en la jurkunveno ankaŭ Jin submetiĝis al ĝi. La lando Yue profitante la okazon kiam

VORTARO

ài	ami	bàba	patro
bàozhǐ	jurnalo	bǐjìben	kajero
dú	legi	érz	filo
gāngbǐ	plumo	hé	kaj
jiāo	instrui	lǎoshī	instruisto
māma	patrino	méiyǒu	ne havi (esti)
nǐ	ci, vi	nǐmen	vi (pluralo)
qiānbǐ	krajono	shū	libro
tā	li, ŝi	tāmen	ili
wǒ	mi	wǒmen	ni
xuéshēng	lernanto	yǒu	havi
zhège	tiu ĉi		

Tomu

la granda armeo de Wu sin okupis en la Centra Ĉinio, ekatakis Wu-landon, ĝin renversis post kelkjara militado, kaj okupis la vastan regionon de la malsupra parto de Yangzi-rivero.

En la militoj, la potencaj landoj aneksis multe da malgrandaj landoj, la potenco de la reĝo de Zhou fariĝis pli malgranda, eĉ ne kompareble kun tiu de malgranda princlando. Li perdis sian aŭtoritatecon ĉe la vasaloj. La grandaj potencaj landoj ekkolektis de la malgrandaj princlandoj tributon el jado, silkaĵo, ĉevalo, kaj feloj de cervo, tigo kaj leopardo.

Dume post longtempa interkontaktiĝo, Huaxia-kaj Rongdi-anoj intermiksiĝis iom post iom.

C. La Kulturo de la Epoko de Printempo kaj Aŭtuno

Konfucio Konfucio (551 a.K.—479 a.K.), Lu-landano, estis la plej granda instruitulo de la antikva Ĉinio.

Konfucio kondamnis la militojn en sia epoko, kaj la tro pezan ekspluatadon al la popolo.

Konfucio rondvizitis multajn landojn por efektiviĝi sian politikan ideon, tamen neniu el la princoj ĝin akceptis. Post kiam li revenis al Lu-lando, li sin okupis ekskluzive pri ordigo de la antikvaj libroj: “Shangshu”, “Chunqiu”, “Li”, “Shijing” k.a. “Shangshu” aŭ la Pratempa Libro, enhavas gravajn anoncojn kaj dekretojn registarajn

de antikvaj tempoj. “Chunqiu” aŭ Printempo kaj Aŭtuno, estas verkita surbaze de historia libro de Lu-lando. “Li” aŭ la Libro de Etiketo, estas libro pri diversaj etiketoj en la politika kaj socia vivo de la antikveco. “Shijing” aŭ la Klasika Libro de Poemoj, estas kolekto de antikvaj poemoj. Tiuj ĉi libroj estis konservitaj antaŭe de aparta ŝtatificisto. Post ordigo fare de Konfucio, la scioj hereditaj de antikveco diskoniĝis.

Konfucio havis pli ol tri mil disĉiplojn. Li edukis ilin per lernado de la “Ses Artoj” t.e. etiketo, muziko, sagopafado, direktado de veturilo, legado kaj aritmetiko. Kiam li vojaĝis tra diversaj landoj, lin sekvis multe da disĉiploj.

Shijing Ĝi estas la plej antikva poemaro de Ĉinio kaj enhavas 305 poemojn.

Tiuj ĉi poemoj prikantis multajn kortuŝajn scenojn: en vasta kamparo, diligentaj kamparanoj plugadis ŝviton gutigante; en montaro sunplena, infanoj kolektas freŝverdan sovaĝlegomon; sur herbejo ĉeborda, gejunuloj kantas kaj dancas kontraŭ vento printempa. Aliaj poemoj priskribis la vivon de ekspluatataj kamparanoj kaj ilian indignon.

La vivo, penso kaj sento de la ĉina popolo en la antikveco, vive kaj klare respeguliĝas en ĉi tiuj poemoj. De pli ol du mil jaroj ĝi estas ŝatata de la ĉina popolo kaj okupas ankaŭ altan pozicion en la monda literaturo.

Trad. Zensto

La Unua Muzeo de Ruino de Neolita Epoko

MALFERMIĜIS la unua Muzeo de ruino de neolita epoko en nia lando je la unua de aprilo. Tiu ĉi muzeo konstruiĝis sur la ruino de neolita

vilaĝeto el antaŭ 5 mil jaroj ĉe Banpo-vilaĝo proksima al Xi'an, la ĉefurbo de Shānxi-provinco. La elfosita ruino de pli ol 40 domoj kaj ĉe apudaj kavernoj

estas konservitaj per nove konstruita granda salono ampleksanta 2,300 m². La truoj por fiksi kolonojn de la domo, duonfalintaj muroj, vojsurfaco kaj kavernoj estas malmoligitaj per specialaj procedoj por ke ili povu esti konservitaj longtempe. Laŭ la plano oni ilin kovros poste per





SUR NIA LIBROBRETO

Adam Mickiewicz: Sinjoro Tadeo — tradukita de Antoni Grabowski, lukse bindita kaj bele ilustrita per 11 tutpaĝaj bildoj, 324 paĝoj.

Boleslaw Prus: La Faraono — tradukita de Kazimierz Bein (Kabe), 962 paĝoj en tri volumoj kun kartona kesto.

Henryk Sienkiewicz: Quo Vadis — tradukita de Lidia Zamenhof, 718 paĝoj en unu dika volumo.

Julian Tuwim: Poeziaĵoj — kolekto de poemoj de J. Tuwim kaj liaj tradukaĵoj, 130 paĝoj.

Zofia Nalkowska: Medalionoj — tradukita de Tadeusz Hodaowski kaj Isaj Dratwer, en malpli granda formato 11.5 × 17.5 cm., 110 paĝoj.

Jen antaŭ nelonge venis al nia Ligo la 5 libroj senditaj de Asocio de Esperantistoj en Pollando. Ili ĉiuj estas eldonitaj de la Eldonejo Polonia. Mi tre ĝojas havi okazon tralegi aŭ refoliumi tiajn riĉajn literaturajn verkojn el Pollando kaj gratulas la sukceson de la Eldonejo Polonia kaj meriton de niaj polaj samideanoj.

La tri unuaj estas malnovaj Esperantaj libroj, sed eldoniĝis en nova vesto per pli bona papero kaj en pli bonaj aranĝoj. La lastaj du estas tute novaj. Tamen mi aplaŭdas ĉiujn tiujn eldonojn. La verkoj de A. Mickiewicz, B. Prus kaj H. Sienkiewicz ja ne estas fremdaj al ĉinaj esperantistoj kaj eĉ al la ĝenerala legantaro. Jam dufoje eldoniĝis la ĉina traduko de Sinjoro Tadeo (trad. de S-ano Sun Yong), aperis du malsamaj kaj nekompletaj tradukoj de Quo Vadis (trad. el japana

traduko), kaj antaŭ 20 jaroj nia S-ano Wang Lu-yan jam enĉinigis La Faraonon laŭ Esperanta traduko. Sed la manuskripto perdiĝis kaŭze de militaj cirkonstancoj. La traduko de Sinjoro Tadeo estas farita proze, do neeviteble multe perdiĝis la beleco kaj allogeco de la originalo. Tial estas rave por mi tralegi ĉiujn tiujn verkojn en Esperantaj tradukoj, kies altan valoron kiel Esperanta literaturo, fidelecon al la originaloj enhave kaj forme jam estas monde rekonataj. La belaj priskriboj pri la naturj pejzaĝoj, kaj vivecaj figuroj el la historiaj socitavoloj de Pollando (Sinjoro Tadeo), la streĉaj bataloj inter la juna princo kaj pastroj en Egipto (La Faraono) kaj tiu inter la kadukiĝanta Roma Imperio kaj la kreskanta Kristanismo (Quo Vadis) en Neraepoko helpis min pli bone konatiĝi kun pola literaturo kaj eĉ pli bone kompreni la his-

torion de Egipto, Romo kaj Pollando.

Komprenoble ĉiuj tiuj libroj estas trezoroj de Esperanta literaturo kaj rekomendindaj al ĉiuj esperantistoj, tamen mi volas ĉi tie precipe atentigi la legantojn pri la malpli impona libreto **Medalionoj**. Tiu ĉi libreto ne estas novelaro, sed dokumentecaj rakontoj pri la malhomecaj terurajoj de la Hitleraj faŝistoj. Evidente la verkintino klopodis tute sobre kunordigi en plena lumo sole la nudajn faktojn, kies plej fragmenta harstarigas ĉiun ordinaran homon. Kiu iam supozus, ke vivantaj kunhomoj povas esti nur krudaj materialoj por produkti ĉiutagajn necesojn pro aliaj homoj? Kaj tamen tio estis simple politiko de la faŝista reĝimo kaj discipline plenumita! El tio oni povas kompreni kiel profunda estas la plendo de la verkintino: "homoj al homoj preparis tiun ĉi sorton".

La teruraj ombroj pri kiuj la libreto rakontas jam forpasis, sed ĉu la fantomo revenos aŭ ne, multe dependas de la diligenta batalo de la pacaj batalantoj, inter kiuj troviĝas ni esperantistoj.

H. F.

. KURANTAJ * AFEROJ . KURANTAJ * AFEROJ . KURANTAJ * AFEROJ .

ANTAŬENIRO DE TINKTURILAFABRIKADO DE NIA LANDO

Ĉinio nun antaŭiras en la nombro de specoj en fabrikado de la tinkturiloj kun aktiva radiko, kiujn fabrikas unua Britio, kun 21 specoj laŭ nia scio, kaj postsekvas Svislando kaj la Okcidenta Germanio.

En nia lando ilia fabrikado komenciĝis nur de ĉirkaŭ duona jaro en Ŝanhajo. La specoj fabrikataj nun nombriĝas 32, kun kvalito tute komparebla kun tiu de britaj produktoj. La metodojn por fabriki tiujn

novajn tinkturilojn trovis juna teknikisto 26-jara, Xi Xiang-yun kaj aliaj kunlaborantoj.

LA UNUA UNIVERSALA AŬTO EN ĈINIO

En la aŭtoripara fabriko en Baotou, la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, la laboristoj sukcesis antaŭ nelonge fabriki unu universalan aŭton. Ĝi funkcias krom kiel transporta ĉaro, ankaŭ kiel traktoro por diversaj kampaj laboroj. Ĉe ĝia fino troviĝas rado, kiu povas movi dinamon, pumpilon, mekanikan herbotranĉilon, segmaŝinon k.a.

vitraj kovriloj. La grandaj objektoj, kiaj kuiriloj, vazoj por elĉerpi akvon kaj argilaj potoj por enterigi infanon, trovitaj en la ruino estas konservataj en sia origina pozicio.

En la muzeo troviĝas ankoraŭ aliaj du ĉambroj por ekspoziciaĵoj. En ili oni povas vidi la elfositajn objektojn kaj modelojn, nome ŝtonhakilojn, ŝtonajn

ilojn, pezilojn por fiŝretoj, argilajn vazojn kun desegnoj de fiŝoj, cervoj kaj homkapaj figuroj k.t.p. Troviĝas ankaŭ ostaj fiŝhokoj preskaŭ same delikataj kiel produktaĵoj nuntempaj, ornamaj ostaj globetoj kaj valoraj jaspaj orelornamajoj. La riĉaj materialoj ebligas al la vizitantoj pli komplete ekkoni la produktajn instrumentojn uzat-

ajn de la homoj en neolita epoko kaj iliajn loĝejojn, manĝaĵojn, vestaĵojn kaj socian vivon.

Tiu ĉi muzeo ekkonstruiĝis komence de 1956. Oni ankaŭ intencas organizi Komitaton por Sciencaj Studoj pri la prahistoria ruino ĉe Banpo-vilaĝo kaj invitos arkeologojn, specialistojn en la universitatoj partopreni la studajn laborojn.

Esperanto-movado en Ĉinio

*En Chengdu-a Financa Instituto de Sichuan-provinco, la sindikato fondis en januaro Esperanto-kurson. Aliĝis pli ol 10 personoj. El ili troviĝis docentoj, asistantoj de profesoroj, administrantoj de la instituto kaj profesoro. Ĝin gvidas k-do Liu Hong-kang, profesoro de tiu instituto.

*En Longwangzui-kolhozo de Hubei-provinco fondiĝis en januaro Esperanta grupo. Ĝi havas 13 membrojn. Ĝin gvidas k-do Li Languang. Li mem kompilis kursolibron por la lernado, kiu okazas unufoje po du tagoj.

*K-do Wang Yun-xin organizis novan Esperantan grupon en Fularji de Heilongjiang-provinco. Pli ol 10 junuloj partoprenis. Ili lernas laŭ la libreto "Aboco de Esperanto" du- aŭ tri-foje en ĉiu semajno.

*En marto organiziĝis en la Ŝtata Arbara Farmo de Dakang-monto en Guangdong-provinco Esperanta kurso. Aliĝis komence 9 lernantoj kaj poste plimultiĝis ĝis 15. Ĝin gvidas k-do Ĝolabio.

*La Esperanto-grupo en Bengpu de Anhui-provinco disvolviĝis en du grupoj. La membroj nombriĝis entute 23. Akirinte kunlaboron de la Filio de la Asocio por Popularigo de Sciencoj ili malfermis Esperantan kurson. 15 lernantoj lernas en

*K-do Hujucz, prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo akceptis la invition de la Internacia Organiza Komitato por la Festoj de la Zamenhof-jaro esti ĝia membro por preparado de la festoj de Zamenhof-jaro.

*K-do Kiraly, hungara esperantisto kaj K-do D. L. Armand, sovetia esperantisto, unu post la alia venis al Ĉinio en marto kaj majo. Tio estas por ili ambaŭ jam la tria fojo viziti Ĉinion.

. KURANTAJ * AFEROJ . KURANTAJ * AFEROJ . KURANTAJ * AFEROJ .


REĜO DE LA "REĜOJ DE KOLZOJ" (repaĵoj)

Kolzo estas unu el la ĉefaj oleproduktaĵoj plantoj en Ĉinio. En la klopodado por altigo de ĝia rikolto fare de tutlandaj kolz-plantistoj, ekaperis en multaj lokoj "reĝoj de kolzoj". La unuan lokon verŝajne okupas la reĝo de la "reĝoj de kolzoj" lasttempe trovita en Zhonggubernio de Sichuan-provinco. Ĝi altas 1.93 metrojn. La ĉefa trunko ĉe radiko estas pli dika ol pugno. Ĝi havas 47 branĉojn kaj pli ol 700 malgrandajn branĉojn kun pli ol 50,000 legumenoj. Ĝi estas nun ekspoziciata en la agrikultura ekspozicio de Wan-gubernio de Sichuan-provinco (vidu la foton), kaj montras

Ĉinaj esperantistoj tre ĝojis revidi la malnovajn amikojn. K-do en Ĉina Esperanto-Ligo ilin bonvenigis kaj faris kun ili intimajn interparolojn.

* Moskva Esperantista grupo "Fajrero" komisiis al k-do D. L. Armand okaze de lia vizito al Ĉinio alporti al ĉinaj esperantistoj valorajn donacojn. Inter ili troviĝas flageto, bele lakita ligna florbotelo, verdaj steloj kaj esperantaj kovertoj kun vortoj de M. Gorki. K-do Hujucz reprezentante Ĉinan Esperanto-Ligon ilin akceptis kaj esprimis profundan dankon al la Moskvaj kamaradoj.

al la rigardantoj kian eblecon oni havas por altigi la rikolton de kolzsemoj.



NOVAJ POŝTMARKOJ


ANTAŬ nelonge la ĉina poŝto eldonis 3 poŝtmarkojn montrantajn novajn sukcesojn de arkeologiaj laboroj. Ili estas: 1) Kaoliŝanio (speco de trilobito) en paleozoa erao, presita en blua koloro, 2) Lufengosaŭro (peco de dinosaŭro) en mezozoa erao, presita en bruna koloro kaj 3) Megaceroso (dikkorna cervo) en neozoa erao, presita en verda koloro. Sur ĉiuj tiuj poŝtmarkoj troviĝas du bildoj: malsupre estas bildo montranta fosilian parton de la respektiva besto kaj supre ĝia kompletigita formo.

KAOLIŜANIO en Haoli-monto estas nomita pro tio ke ĝi estas trovita en tiu monto en Shandong-provinco. Tiu ĉi insekto longas je nur 3 ĝis 6 cm. Ĝi vivis en la maro de la Paleozoa erao antaŭ ĉirkaŭ 500,000,000 jaroj.

LUFENGOSAŬRO, estas la plej fama el la dinosaŭroj en mezozoa erao. Ĝiaj postsignoj troviĝas en preskaŭ ĉiuj partoj de Ĉinio. La plej grandaj longis pli ol 30 metrojn kaj pezas proksimume 30-40 tunojn. La montrita fosilio de dinosaŭro estas trovita en Lufeng-gubernio de Yunnan-provinco. Ĝi estas la plej kompleta el la ĝis nun trovitaj.



Kaoliŝanio



Lufengosaŭro



Megaceroso

MEGACEROSO estas besto en neozoa erao. Ĝia kompleta fosilio trovita ĉe la vilaĝo Zhoukoudian, proksima al Pekino, ne estas sama kun tiuj trovitaj en aliaj landoj. La kornoj estas tre larĝaj kaj grandaj kaj plie ĝi ne estas rinda, nek zigzaga sed iom plata. En la fosajo de Zhoukoudian oni trovis grandan kvanton da rompitaĵoj kaj bruligitaj ostoj de tiu besto. Tio pruvas, ke antaŭ 500,000 jaroj tia cervo ne nur vivis en tiu regiono kun la ĉinaj simihomoj sed ankaŭ povus esti ilia ĉefa manĝaĵo.

Amatpoludy

Legu . . .



— bele ilustrita monata gazeto anglalingva —

ARTIKOLOJ pri agrikulturo, industrio, komerco, eduko, religio, artoj, socia bonstato kaj ĉiutaga vivo de la 600 milionoj da ĉinaj popolanoj

RUBRIKOJ pri komerco, kulturaj aferoj, ĉinaj poŝtmarkoj, kuirarto, ĉina lingvo, sporto, virinoj, infanoj ktp.

SUPLEMENTOJ trifoje en ĉiu jaro

KOVRILOJ KAJ BILDPAĜOJ en multaj koloroj

Eldonas: La Ĉina Bonstatiga Instituto, Soong Ching Ling (S-ino Sun Yat-sen), prezidanto

Abonu ĉe via librejo aŭ rekte skribu al:

CHINA RECONSTRUCTS, Wai Wen Building, Peking (37), China

(Proveksemplero) sendiĝos al ĉiu petanto)



1944